HUNGARA VIVO

5
1974
8,— Ft

MEG
SALGÓTA

HOSSZÚ fecske

FÜSTSZŰRŐS CIGARETTA ÚJDONSÁG

Fumfiltrila cigaredo — novaĵo

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
1368 Budapest, Hungario,
Kenyérmező u. 6.
Aperas dumonate
XIV. jaro. 1974. 5-a numero

Numero pri la originala Esperanto - dramo

ENHAVO

William Auld: Originalaj dramoj en Esperanto 1
A. Goodheir: El la „Nordaj strofoj" 3
J. Baghy: Sonĝe sub pomarbo (fragmentoj) 4
P. Rados: Kompara analizo de tri dramoj de Julio Baghy 5
M. Boulton: Kelkaj pensoj pri dramverkado 6
E. Tóth: Kristnaska saluto (radioludo) 8
Gyula Illyés: En la flava domo 11
Imre Szenes: Intervjuo kun Sándor Gáspár, ĉefsekretario de la Landa Konsilio de la Sindikatoj 12
D-ro J. Mátéffy: Eĉ guto malgranda... 15
D-ro F. László: La ŝirmado de nia medio estas komuna afero de la homaro 16
Lajos Tárkony: Revuo de revuoj 20
Szilárd Bálint: La inaŭguro de tomboŝtono de Julio Baghy 21
Sz. Bálint: Panoramo 22
M. Tóth—Máthé: Lingvokurso 24
D-ro L. Lesznai: Socio kaj muzika kulturo 26
P. Balkányi: Dudekjara la Pionira Domo en Pécs 28
L. Rieth: Leterkesto 28
Recenzoj (L. Rieth — Benczik) 28
K. Kalocsay: Lingvo kaj logiko 29
S. J.—Ba.: Hamburgo — UEA kongreso 30
Krucenigmo 31
Humuro 32

Sur la titolpaĝo: Mayda Ambren el Kubo, studentino en Budapest, Teknika Universitato — Foto de István Kotroczó

William Auld:

ORIGINALAJ DRAMOJ EN ESPERANTO

I.

Oni ne povas diri, ke la dramo estas tre vigle viva artformo en Esperanto. Kvankam dramoj kaj drametoj estis prezentataj ĉe diversaj Universalaj Kongresoj, naciaj kongresoj, k. s., estas konstateble, ke eĉ tiam la prezentitaj verkoj plejofte estis tradukoj; ekzemple, nek la Internacia Arta Teatro, Parizo — se ni esceptas la filmon „Angoroj" — nek la Bulgara Esperanto-Teatro iam elektis verkon originalan por prezentado al la esperantistoj. Kaj ni konfesu ke, se ili eĉ volus tion fari, ili nur kun granda malfacilo, kaj en tre limigita kadro, elfosus ion prezentindan. Oni emas pensi, ke grava antaŭkondiĉo por taŭga dramverkado estas la ekzisto de entuziasmaj teatraj grupoj, kiuj efektive nur sporade aperis en la movado.

Ankaŭ la analoj de la ĉiujaraj Belartaj Konkursoj de UEA konfirmas tiun malfortecon de la drama fako. La drama branĉo de la B.K. naskiĝis en 1951; en la 23 konkursoj depost tiam, unua premio estas aljuĝita en tiu branĉo nur 11-foje — *kaj lastfoje en 1964!!* La premiitoj estis: *Daly, Jervis, Auld, Seemann, Marjorie Boulton* (kvarfoje!) *Samyn, Emilija Lapenna,* kaj *Put.* La sukceso de *Marjorie Boulton* estas ja meritita: ŝi montriĝis preskaŭ la sola produktiva kaj samtempe faksperta dramisto en nia lingvo; eble nur *Emilija Lapenna* montris similan celkonscion kaj faksperton (unu ŝia drameto, *Amforo,* speciale aranĝita por kontraŭpezi la ordinaran mankon de okazoj por antaŭprovado ĉe internacia aktoraro, estis sukcese prezentita ĉe la 57a U.K. en Portlando). Kelkaj verkoj — precipe skeĉoj — de M. Boulton estis diversloke prezentataj, sed mi kun bedaŭro ankoraŭ ne havis okazon vidi prezentataj kelkajn el ŝiaj pli seriozaj, socitemaj dramoj, pri kiuj mi poste skribos pli detale.

II.

La periodo 1906—1913 estis kvante nia plej produktiva dramperiodo. Laŭ mia scio, nia unua dramverkisto estis la ruso *Devjatnin.* En la dua volumo de lia „Plena verkaro", aperinta en 1906, troviĝas komedio en tri aktoj: *Edziĝo,* kun triviala temo de adulto kaj ruzoj. Pura farso, kompreneble. Tamen, kvankam karakterizo estas preskaŭ ne ekzistanta en la dramo, ni notas kun granda kontentiĝo, ke la lingvaĵo de la rolantoj estas tre vive vigla, klara la produktaĵo de menso, kiu kutime vivadis rekte per oftega, eĉ ĉiutaga, uzado de la lingvo Esperanto. La sama eco distingas alian, iom pli maturan, komedion en 4 aktoj, *Nefinita dramo* (1911), de la sama aŭtoro. Tiu ĉi estas longa, ambicia farso, en kiu verkisto manipulas rolantojn, por ke ili travivu dramon, kiun li samtempe verkas. Kiel ĉiuj farsoj, ĝi estas supraĵa, tre neverŝajna — tipaĵo de la epoko, tamen surprize sukcesa, kaj certe prezentebla, antaŭ ĉio pro la jam menciita flua, natureca lingvaĵo. El la dramoj de la nomita epoko, *Nefinita dramo* estas laŭ mia opinio la ĉefa.

Tiu periodo vidis publikigon ankaŭ de aliaj farsoj. *La onklino el Ameriko* de *H.J. Bulthuis* (1908) estas apenaŭ pli ol tre neverŝajna ŝerco, plimalpli nur skeĉo. En *La amkonkurantoj* de *Reinhold Schmidt* (1911, kun 2a eld., 1924), patro por sia filino preferas junan aktoron, la patrino maljunan riĉegulon: kompreneble la patro, kun helpo de la aktoro, venkas la riĉeĝulon, kaj la junaj geamantoj vivos poste en feliĉa geedzeco. Notinde estas, ke la „aktoro" parolas verse en la lasta akto. Reinhold Schmidt havis ambiciojn tiurilate, ĉar en la antaŭa jaro (1910) aperis lia *Gustav Vasa,* historia dramo en kvin aktoj pri sveda heroo: multvorta versdramo de konata speco, en kiu la rolantoj komunikiĝas per longaj senagaj paroloj (la agadoj okazas plejparte nevidate, laŭ la klasikaj grekaj modeloj). Bedaŭrinde, Schmidt ne estis ia ŝekspiro, kaj lia verslingvaĵo estas kruda, tute ne flua, kaj ofte ne tre glate komprenebla.

Alia farso estis *Geedzigopeto* (tiel!), de *„Roksano"* (Jeanne Flourens), (1913). Ĝi baziĝas sur la premiso, ke la patro de amanto estas stereotipa „distrita sciencisto", kaj la patro de la amantino havas patologian timon pri mikroboj. La sciencisto, irinte al la hejmo de la mikrobtimanto, distrite kredas, ke li troviĝas en sia propra domo, kaj el tio sekvas, kompreneble, la necesaj miskomprenoj. Eĉ laŭ farskriterioj, la situacioj estas elstare falsaj. Oni multe mencias, cetere, — kaj demonstras — la sanigan efikon de la ... kisado.

Aperis ankaŭ kelkaj dramecaj, eĉ tragediaj, teatraĵoj. *Nadina Kolowrat* verkis: *Morto kaj Vivo* (1907), kaj *Portreto* (1909). Ambaŭ drametoj aperis kune en volumo *Misteroj de amo* (1909). La unua estas iom peza, multvorta, filozofiema, eĉ dekadenca, fabelo pri Morto, Vivo kaj Amo: la Morto invitas Virinon, kiu teniĝas al la Vivo per Amo al Poeto; post lia foriro, ŝi iras al la Morto. La dua estas tre similstila, vere enuiga melodramo pri amo de Artistino. La simbolisma koncepto de la du dramoj estas iom

simpatia, sed la artisma talento de la aŭtorino ne sufiĉe profundas por sukcese subteni ŝian intencon.

F. Pujulà-Vallès verkis du unuaktajn drametojn, kune aperintajn en *Frenezo* (1909), nome: *Aŭtunaj ventoj* kaj *Novelo* (la dua estis ludita en Parizo la antaŭan jaron). *Aŭtunaj ventoj* temas pri gekamparanoj, kies paŝtisto sin mortigis. Nova paŝtisto minacas fari same, sed foriras. Ĉio dependas de atmosfero, etoso de timo kaj superstiĉo. En *Novelo,* murdinto revenas al la loko de sia murdo; ankaŭ li estas freneza, kaj denove la dramo dependas de atmosfero — fakte, teruro. Bone ludate, ili povus sufiĉe sukcesi.

La povo de l' amo de *Lamarche* kaj *Boulet* (1908) estas naiva intrigo pri rompota gefianĉeco, solvita simple per pledo de la fianĉino. Tamen la konversacioj estas realecaj, kaj la karakterizo de la diversaj rolantoj estas pli ol kutime kompetenta.

Probable la plej konata teatraĵo el tiu frua periodo estas *Ginevra* de *Edmond Privat* (1913, 2a eld., 1925), kiu almenaŭ dufoje estis prezentita en Universalaj Kongresoj (Julio Baghy reĝisoris ĝin kaj ankaŭ ludis rolon, ĉe la Ĝeneva kongreso). Kiel *Gustav Vasa,* ĝi estas verse verkita, sed la juste fama stilo de Privat certigas, ke la lingvaĵo restas flua kaj komprenebla. La temo estas tre malnova legendo en la keltaj landoj, pri Reĝo Arturo kaj la adulta amo inter lia reĝino Ginevra kaj lia amiko Lanceloto. La drameto de Privat prezentas tre simpligitan version de malgranda parto de tiu legendo.

III.

En 1923, *Bulthuis* provis krei iom pli solidan dramon: *Malriĉa en spirito.* Temas pri ĝemelaj fratoj, preskaŭ nedistingeblaj aspekte inter si. Unu el ili idiotiĝas pro akcidento; la alia, kiel armeano, estas ekzekutota. Pro religiaj konceptoj neklare komprenitaj sed fortefikaj, la idioto sukcesas interŝanĝi lokon kun sia frato. Pro ia kaŭzo — vere, ne tre klara al mi — la idioton oni tamen ne mortpafas. Kvankam la dramo ne estas tre verŝajna, oni juste povas saluti la intencon de la aŭtoro krei iom pli emocian dramon ol estis la plimultaj antaŭaj.

La lastan el la fruaj farsoj (se ni esceptas tute mallongajn skeĉojn kaj scenetojn) eldonis en 1924 *Nikolai Hohlov: La morto de la Delegito de UEA.* Eĉ kiel farso, ĝi estas kruda. La Delegiton oni kredas mortinta, kaj kuŝigas la „kadavron" sur oportunan kanapon. Kompreneble, li vivas; kaj kiel „mortinto" li aŭdas multajn sekretajn aferojn. En la fino li sukcesas anstataŭigi sin sur la kanapo per negra esperantisto, kiu neatendite „viviĝas". Enestas iometete da satiro pri la E-movado, ekz-e la tipeca nekrologo, kaj la oportunismo de iuj, kiuj esperantistiĝas pro tute neindaj motivoj, tamen la drameto estas tre leĝera.

La aktoro *Baghy* en 1929 eldonis sian dramon *Samumo* (en la volumo „Migranta plumo"). Kiel kvintesence en ĝi montriĝas la fortoj kaj malfortoj de la fama aŭtoro! Kaj kial ne? — ĉu ĝi ne ripetas lian ĉefan kaj ĉiaman temon: tentado de ĉasta viro far malprudente pasiega virino? Ne mankas ankaŭ, kompreneble, la ĉeesto de lin adoranta, sinofera ĉifonulino, lia „bona anĝelo", kies adoro tamen ne sukcesas reteni lin de la peko... Kompreneble, ne mankas altflugaj pensoj:

Mary: Eh, vi ne havas koron.
Robby: Mi havas, sed ĝi volas flugi per la flugiloj de l' spirito. Ĝi ne volas esti ligita al la profana realeco de l' karno. Ĝi volas rifuĝi al la ĉasta mondo de la artoj...

... kaj tiel longe plu. Estus facile moki tiun eksmodiĝintan — se entute ĝi iam estis moda — ĝenron. Kaj tamen, tia estas la drama preteco de Baghy, ke oni povas imagi tiun melodramon, en rondoj ne tre mondumecaj, sukcesa kaj efika, se nur pro la krudaj emociaĵoj en ĝi tiel arde kaj sincere sentigitaj.

Kenelm Robinson, per sia *Homarisma laboro* (1931), estis la unua, kiu verkis dramon kun didaktika socia celo. Tiu dramo estis vere bone konstruita, kaj nur la malaktualiĝo de la temo — nome, la fundamentaj ŝanĝiĝoj okazintaj en la socio mem — kaŭzas, ke hodiaŭ la drameto ne plu estus tiel trafa. Tia, kompreneble, estas tro ofte la sorto de verkoj didaktikaj — eĉ la genio de Ibsen, ekzemple, apenaŭ sufiĉas por validigi hodiaŭ lian dramon *Reaperantoj. Homarisma laboro* prezentas „progreseman" burĝon, kiu interesiĝas pri avangardaj temoj — Edukado, Ligo de Nacioj, Esperanto — kies du filoj havas seksajn problemojn pro lia pruda kaj memkontenta sinteno al ilia edukado. Robinson ĉi tie, kiel en aliaj verkoj, atakas la anglan eduksistemon kaj la neŭrozojn spertitajn, laŭ li, rezulte de tiu sistemo.

En la fatala jaro 1939 aperis la plej sukcesa el la komedioj en Esperanto: *Levu la manojn!* de *F.V. Dorno.* Verki komedion estas treege malfacile; sed jen ni povas konstati profesian nivelon de verkado. Kompreneble, la temo estas triviala — trompoj kaj miskomprenoj — sed la agado okazas rapide, la paroloj estas fluaj, la renversiĝoj de la okazaĵoj sin sekvas malenuige, kaj eblecoj por lerte ridiga reĝisorado abundas. Kondiĉe, ke oni prezentus la dramon laŭ taŭge rapida takto, lertaj geaktoroj ankaŭ hodiaŭ rikoltus sukceson per tiu ĉi dramo.

En 1953 *Gustav Vasa* trovis sian posteulon, centoble pli maturan kaj kompetente faritan: *Ivan VI,* kvinakta historia teatraĵo de *Geraldo Mattos.* Kiel poemo la verko estas leginda; sed kiel tragedio kaj prezentebla dramo ĝi ŝajnas malpli sukcesa. Temas pri la malfeliĉa sorto de la rusa caro; kiel tragedio, ĝi malsukcesas pro manko de pozitivaj kvalitoj ĉe Ivan kaj liaj subtenantoj. Tragedion estigas malvenko de eksterordinara homo, kiu devigas al si profundan simpation de la rigardantoj; nek Ivan nek Mirovič montriĝas kredeble homaj — fakte, neniam evidentiĝas, kiu el ambaŭ estas, laŭ intenco de la aŭtoro, la ĉefheroo. Laŭforme la verko ne sidas indiĝene en la dudeka jarcento. Plej ofte la leganto konversacias per moralaj monologoj aŭ per aforismoj:

Al plia krimo puno nin instigas,
Dum al la virto la pardon' devigas.
La severeco estas la mantelo
Por koleremo, venĝo kaj kruelo...

kaj tiel plu dum 40 versoj. Krome, ne mankas eksmodaj manovroj, kiel supernaturaj voĉoj kaj flankparoloj. Poezia fortostreĉo de juna poeto, kaj *literatura* akiro por la lingvo, sed estas dubinde, ĉu oni iam serioze pensos surscenigi ĝin.

El la Biblio ĉerpis du aŭtoroj poste siajn temojn. La unua, *Francisko Azorin,* publikigis en 1954 sian drameton *Adamo kaj Eva;* kaj en 1957 *J.D. Applebaum* aperigis sian *Jozefo. Adamo kaj Eva* en mallonga kadro kondukas nin el la Paradiza Ĝardeno ĝis la mortigo de Habelo far Kaino — kaj fine ĝis la unua adulto de Adamo. *Jozefo* estas drama poemo en kvar aktoj kaj epilogo. Ĝi estas verkita laŭ heksametroj, „kies varioj", atentigas Reto Rossetti, „proksimiĝas al la ritmoj de spontana parolo". Tiu heksametra verkado estas fakte interesa, kaj povus montri la vojon al signifa estonta rimedo por similaj dramoj, tamen ĝi posedas ankaŭ tiun negativan kvaliton, ke ĝi tro facile tentas al la multvorteco, kaj ankaŭ Applebaum, laŭ mia opinio, falas en la kaptilon de troa monologado. Mi ne dubas, ke la dramo povus potence efiki sur la scenejo — kaj tiurilate estas notinde, ke 19 el la roloj estas ludeblaj de nur 7 geaktoroj!

Adamo kaj Eva nomiĝas ankaŭ la ĉefrolantoj en la grandioza lirika komedio de *Julio Baghy: Sonĝe sub pomarbo,* kiu aperis en 1958. Oni povas nur admiri la vizion de la aŭtoro, kaj lian potencan kapablon realigi ĝin. En tiu ĉi verko Baghy donas sian definitivan filozofion, la apoteozon de tiu lia iama devizo: *Amo kreas pacon; Paco konservas homecon; Homeco estas plej alta idealismo.* Jam maljunulo, li kvazaŭ reiras al

A. GOODHEIR

EL LA „NORDAJ STROFOJ"

MARLUMIĜO

Iun nokton
trenante ŝnurojn
tra mar-kolo
dum fiŝkaptado,
mi vidis lum-gutojn
de l'ŝpruco remila
fali en maron
arĝente brilan.

DEPRIMO

Mens-vulturo
ĵetante onbron
antaŭ suno
ŝvebe minacas.
Nur la koro
streĉante senlace
ardon pafarkan
ĝin trafas sage.

SPURO

De statuaj herooj
turniĝinte malŝate,
sur tabuan vojon
metante plandon,
mi serĉas frate
iun ajn, kiu sekvas
tra tempa lando
la spuron eternan.

ARMADA

Rakont' insulana:
„De kvarcent jaroj
kuŝas ŝipo hispana
apud tiu roko.
En kanon' mia avo
kaptis omaron.
Forgesita la loko,
ĉion kovras sablo."

NOKTO ĈE LA MARO

Sur plora fenestro
pluvgutoj hajlas.
En tub' de kameno
la tutan nokton
marvento fajfas.
La mondo perdas
tempan mornon,
dum vento eternas.

siaj fontoj, al la unua enamiĝo de 17-jaruloj, kaj kondukas ilin — en la dirita sonĝo, kompreneble — tra jarmiloj, konfirmante per ili la valoron de la vivo, de la amo, kaj de la espero. Antaŭ ĉio, li en tiu ĉi longa verko demonstras sian poetan majstrecon: neniu alia nia poeto tiel virtuoze manipulis, almenaŭ ne tiel grandskale, la muzikajn eblojn de Esperanto kaj de la rimado. Tia verko povus ŝajni, laŭ supraĵa ekrigardo, iom eksmoda; tamen ni kredas, ke ne estas naive, mencii ĝin apud *La tragedio de l' homo:* la fantazio de Baghy kelkrilate vestas liajn pensojn malpli solene ol vestas Madách la siajn, sed la finefikoj de la du verkoj tre simile postrestas en la leginto. Povas esti, ke la esperantistoj ĝis nun tre subtaksis tiun ĉi dramon.

Kiel jam dirite, la vere elstara dramverkisto nia estas *Marjorie Boulton,* kaj ŝia kolekto de 15 unuaktaj dramoj, *Virino ĉe la landlimo,* aperis en 1959. Pluraj el ili estas nuraj skeĉoj — kvankam tre sukcesaj — sed la plimultaj estas seriozaj, kaj iasence gravaj, verkoj, ĉu komediaj, ĉu tragediaj, ĉu poeziaj. Elstara kvalito de M. Boulton estas ŝia socia konscienco, kaj en dramoj kiel *Virgino ĉe la landlimo, Liberiĝo, 2060,* k.a. ŝi trafe komentarias la homan situacion. (Ankaŭ post aperigo de la volumo ŝi verkis elstarajn dramojn, el kiuj mi menciu aparte *Nia sango,* aperinta en „Monda kulturo", 1962.). Ĉiam ŝin koncernas la homaj dilemoj, kaj la psiĥaj malĝojoj kaŭzitaj de sensentemo, netoleremo kaj krueleco. Aliflanke, ni konstatas, ke M. Boulton havas viglan bonhumoron, kaj scias krei ankaŭ tre komikajn situaciojn. Ŝia talento estas tre larĝgama, kaj diversfaceta. En kelkaj dramoj regas forta fantazio; en aliaj, tamen, — kaj tio estas la ĉefa novaĵo por ni ĉe ŝiaj dramoj — ŝi pentras rekoneblajn kaj realecajn, eĉ foje ĉiutagajn, mediojn. Vera maloftaĵo en nia dramo, ĝis tiam preskaŭ tute neekzistinta.

La turo inter nuboj de *Jan* kaj *Karel Filip* (1964) estas kvinakta dramo pri Sankta Barbara, kaj, kvankam impona, havas ecojn certagrade melodramecajn. La rolantoj ŝajnas iomete dudimensiaj.

IV.

Lastatempe aperis la tekstoj de du dramoj efektive prezentitaj sur la scenejo, kaj verkitaj precize tiucele. Ili estas *La reto* de *Bukar* (1971), kaj *Doktoro Rosales* de *Giorgio Silfer* (1973). En tiu ĉi laŭcela kreado de verkoj por teatro mi vidas nian ĉefan esperon por estonta, pli vigla kaj matura, dramo. *La reto,* prezentita unuavice en Parizo, prenas kiel temon la enfermitan vivon de unubraka fraŭlino en provinca urbeto. Vizito de asekuristo, kiu esploras eblan murdon, alportas unue esperon kaj poste iom da financa sekureco en tiun vivon, sed fine ne sukcesas elŝiri ŝin el la terura agorafobio de ŝia situacio. La lingvaĵo estas salutinde flua.

Doktoro Rosales estas sufiĉe fortefika kaj prezentinda. Temas pri juĝproceso kontraŭ ginekologo akuzita pro eksperimentoj je artefarita fekundigo; kvankam li pretendas sciencan objektivecon, li tamen havas psiĥajn problemojn, kiuj instigis lin al lia agado. Malgraŭ violenta interveno de ŝokita publiko, la juĝado okazas tute laŭleĝe — sed tiu sama leĝaro celas fine detrui lin per truko. Interesa apartaĵo estas, ke la doktoro (kiel fremdlandano) rajtas uzi kaj per samtempa tradukado uzigi Esperanton kiel la lingvon de la proceso.

Estus bele, se tiuj ĉi „pajleroj en la vento" aŭgurus pli viglan agadon far dramaj grupoj kaj grupetoj, kiuj per prezentado de originalaj dramoj — eventuale laŭmende verkitaj de bonaj aŭtoroj — kuraĝigus la kreadon de tia vigla teatro, kia ĝis nun ĉe ni preskaŭ tute mankis!

J. Baghy:

Sonĝe sub pomarbo

(Fragmento el la Dua Akto, Unua Bildo)

Avo (daŭrigante)

Sed sorto de knabino estas viro,
pro kiu revas ŝi kun amsopiro
por propran neston havi, tie ĉarmi.

Avino (emociite)

Parolo via igas min eĉ larmi.

Avo (daŭrigante plu)

Tial pri l'perlo, ke ĝi pli pompadu,
ke vi, sinjoro, ne nur vane svatu,
rezignas nun ni kaj ĝin al vi donas.

Adamo kaj Eva (ekscitite kaj proteste ekstaras)

Adamo (krie)

Protestas mi!

Eva (samtone)

Sed lin mi eĉ ne konas!

Kazimiro (post profunda riverenco)

Honoro, la plej granda,
per tio trafis min.
Promeso estu sankta:
mi feliĉigos Ŝin.

Adamo kaj Eva (ekiras tiel, ke ili poste povu halti malantaŭ la sonĝfiguroj)

Eva (al la Avo)

Mi lin neniam amos.

Adamo

Vin estimi,
geavoj, mi ne ĉesos, sed esprimi
pri tio penson diros mi malmulte:
despota miopeco agas stulte.

Avo (etendante la manon)

Do Kazimir', bonvenon!

Avino (larmante)

Filo nia!

Eva

Aĥ, ne! Neniam!

Adamo

Ĉi decido via
por nia ama ĵuro estas — nulo!

Eva (al Kazimiro

Kukurbo danda, ci, spicista mulo!

(Liberiginte sian manon el la tuko ŝi batas Kazimiron, kiu ne reagas al la bato eĉ ne tuŝanta lin)

Kazimiro (kun profunda klino akceptas la etenditan manon de la Avo. Longdaŭra manpremado)

Adamo kaj Eva (volas malhelpi la manpremadon, sed ili sukcesas interveni nur ĝis la manoj, ne tuŝante ilin)

Adamo (mire)

Mi ne komprenas.

Eva (malespere)

Ho, Adam', mi tristas.

Adamo (cerbumante)

Ĉi fantazikreit' ja ne ekzistas.
Por ŝerci lin nur mia menso naskis.

Eva (plorante)

Nur pro kreaĵo via ni — fiaskis.

(La manpremado finiĝas. La Avino disetendas siajn brakojn por ĉirkaŭpreno. Kun svinga elano Kazimiro same faras. Tiu muta ludo okazas dum la du postaj versoj deklamataj de)

Adamo (malespere)

Mi ne komprenas.

Eva

Por mi tre aflikte.

Adamo

Ĉi aĉa tuko ĝenas, premas strikte.

(En tiu ĉi momento kvazaŭ tondre, megafonvoĉe eksonas la voĉo de Strigo. La citaĵo venas el ekster la scenejo tra la spektatorejo. La sonĝfiguroj tuj rigidiĝas en la samaj pozoj, en kiuj ili troviĝis antaŭ la eksono de la voĉo. Oni havas la impreson kiel en kinejo, kiam la ludata filmo subite haltas.)

Adamo kaj Eva (kun alte levita kapo, kiel homoj rememorantaj pri io grava, rigardas al la direkto de la voĉo, sed ilia rigidiĝo ne estas tiel komika kaj pupeca kiel tiu de la sonĝfiguroj)

Voĉo de la Strigo (iom mistere tirate)

„Senmorta lok', senviva stat' — nur esti
sen partopren' pri ĉio nur atesti
kaj migri sur vojet' manstreĉe larĝa,
senpove senti nenifaron ŝarĝa.

(Adamo kaj Eva kvazaŭ somnambule kaj samtakte paŝante trapasas inter la sonĝfiguroj netuŝante ilin kaj proksimiĝas al la forlasita benko)

La puno: vidi vivon preterkura
sen eblo agi en la esto nura,
ĉar Penson ne plu sekvos la Plenumo".

(La voĉo eksilentas)

Adamo kaj Eva (samtempe dum la iro)

„Senfruktaj restos vi. Terura puno".

(Ili eksidas)

Kompara analizo de tri dramoj de Julio Baghy

Mia originala plano estis: profunde analizi dramaturgion de Julio Baghy, sed pro kialoj, kiuj povas esti gravaj por mi sed ne por la legantoj, mi ne sukcesis tion fari. Mi rezignis do kaj decidis limigi min al la analizo kaj komparo de tri verkoj. Inter ili troviĝas du unuaktaj teatraĵoj: „Dum tondras kanonoj" (Norda Prismo 1957/1) kaj „1 : 1" (Ora Duopo, Budapest 1966), krome la triakta lirika komedio „Sonĝe sub pomarbo" (La Laguna 1958.).

La grupo de la legitaj verkoj estas malgranda, sed reprezenta. Inter ili troviĝas serioza teatraĵo („Dum tondras..."), komedieto („1 : 1") kaj t.n. „lirika komedio". Tia ĝenra bunteco miaopinie ebligas, eĉ sen la trastudado de la tuta Baghy-a dramverkado, fari kelkajn bazajn asertojn pri lia dramaturgio.

La unua aserto estas: Julio Baghy, kiel aktoro, homo intime ligita al la teatro, bone sciis, kion ŝatas la publiko kaj la aktoroj en la teatro. Tial en liaj dramspecaj verkoj troveblas frapaj frazoj por la spektantoj, bonaj roloj por la aktoroj. Sed kio mankas? Pri tio poste.

En la unua verko ĉi tie traktota („Dum tondras...") oni renkontas tri ĉefajn rolojn, inter kiuj okazas la agado. Sed tiun agadon oni tre pene povus nomi „dramo", ĉar en dramo la kerno estas la konflikto, kiu ĉi tie tute malestas. La 50-jara instruisto *Soro* kaj lia filino *Ria* rekonas dummilite en vundita soldato *Ullon*, la iaman Esperanto-korespondanton kaj fianĉon de *Ria*, svatiĝintan pri ŝi perletere. Sed li persone jam ne sukcesas svatiĝi, ĉar la fronto rompiĝas, la fremda armeo retiriĝas, kun ili devas iri ankaŭ *Ullo*. La du geesperantistoj komprenas, ke ili tute simile pensas pri milito kaj paco, ili fakte ne estas do malamikoj kaj la verko finiĝas per esperado pri paca futuro. Kontraŭpunkto de la melodramo estas la figuro de *Tini*, la komika najbarino, pranepino de mezepokaj intermedianoj, kiuj devis inter la tristaj scenoj ridigi la publikon.

La komika ludo „1 : 1" montras alian vejnon de Baghy. Ĝi ne estas grandioza verko, sed donas bonegajn eblojn al la du gerolantoj por montri sian talenton de transformiĝo. La esenco de la ludo estas la praa „trompado de la trompinto", bone konata el antikvaj fabloj. En la peco la juna talenta aktorino antaŭ la direktoro ludas la rolon de iama gimnazianino, kiu adoris lin. Kompreninte tion, la direktoro ludas la rolon de ĉagrenita, forlasita viro, kiu suferis de virino tre simila al ŝi. La sceneto finiĝas per kontraktado inter la teatro kaj la juna aktorino.

Ankaŭ ĉi tie la konflikto mankas, la verko tamen estas amuza, humura. La dialogoj estas majstraj, la lingvaĵo perfekta, same kiel en la unue traktita unuaktaĵo.

Sed kion diri pri „Sonĝe"? Ĝi volus esti eble la dramaturgia ĉefverko de Julio Baghy. Sed fakte, kio ĝi estas? Antaŭ ol respondi al tiu ĉi demando, oni devas iom paroli pri la enhavo de tiu „lirika komedio".

Adamo, studento, la „senblazona, malriĉa princo" renkontas kaj ekamas *Eva-n*, la nepinon de la arbaristo. Ili ensonĝe manĝas la pomon de la vivarbo kaj pro tio estas kondamnitaj al ĉiama ESTO, sen VIVO, sen interveno. Ili ne povas malsukcesigi tion, ke *Kazimiro*, la solfilo de la urba spicisto svatiĝu pri *Eva*, poste ili tute senkiale aperas en la estonta mondo de la sensentemaj geteknokratoj kaj senseksaj homunkuloj. Ankaŭ ĉi tie ili ne kapablas interveni. Poste ili vidas la mortantan Teron kaj nur la tie trinkita akvo de morto liberigas ilin disde la eterna ĉeesto kaj la geamantoj povas reveni al la vivo. Je la fino de la komedio la revekiĝintaj geherooj ĵuras unu al la alia eternan amon kaj fidelon.

Kiel klare videblas, la drama kerno, la konflikto denove tute mankas. Krom tio mankas ankaŭ la komponado. Pri tio atestas, ke la unua akto, kie troviĝas la ekspozicio, kaj la lastaj du aktoj kune okupas same po 91 paĝojn. Do al la manko de konflikto ĉi tie aliĝas alia difekto. Tiamaniere la dramo eĉ pli ĉesas esti dramo kaj fariĝas iaspeca lirikaĵo, deklamata de diversaj personoj. Baghy, kiel belvoĉa aktoro, ebriiĝas de la propra voĉsonoro: kiel ĵonglisto li ludas per la perfekte tintantaj rimoj kaj li skribas tri paĝojn tie, kie sufiĉus tri versoj. Krome, la dialogoj interŝanĝiĝas kun kanzontekstoj, atendantaj la operetigon. Tial la tuta verko ricevas opereteskan karakteron.

Sed kial paroli tiom multe pri tio? Ĉar Carlo Minnaja en 1972 en Literatura Foiro nomis „Sonĝe" „preteratentita perlo". Fakte, la versfarado kaj rimado de la verko estas mirindaj, sed ili ne povas kaŝi malplenecon, senkonfliktecon, mankon de komponado, sentimentalan, supraĵan filozofadon pri ESTO kaj VIVO, kiel ekz.: „La puno: vidi VIVON preterkura, sen eblo agi en la ESTO nura..." Jes, jes, vi divenis: tio estas nia olda konato, la Baghy-a temo: „preter la vivo'.

Konklude: la dramverkadon de Julio Baghy, almenaŭ en la analizita reprezenta grupo da verkoj, karakterizas brila regado de la Esperantaj lingvo kaj stilo. La mallongajn pecojn la frapaj dialogoj, la bonaj roloj faras ĝueblaj malgraŭ la manko de konfliktoj. La pli longa verko estas trolongigita, en ĝi troveblas eĉ lokoj malfortaj aŭ opereteskaj.

Pri ĝi aŭ pri tiaspeca verkado de Baghy trafaj estas la vortoj, kiujn en „Sonĝe" li diras pri sia literatura gusto:

Ho, aman romantikon mi preferas,
ĝi aventure traktas, sentojn peras
kaj dum soleco tiklas fantazion
por reve krei el nenio — ion.

Péter RADOS

Marjorie Boulton:

Kelkaj pensoj pri dramverkado

Ho ve, se nur mi kapablus verki bonan esperantan dramon!

La dramarto estas tre valora parto de nacia literaturo. Dramo estas la sola literatura artformo, kiun homoj kutime spertas are; kaj tiuj aŭdantaraj emocioj estas ofte pli fortaj, ol la emocioj en soleco sentataj. Dramo ofte rilatas al nia societa vivo, foje malbonige aŭ almenaŭ frivolige — pro atmosfero de regalo, lukso, modeco; sed ankaŭ bele kaj vivintensige; oni ofte eskortas karan personon al teatro, aŭ kleriĝema grupo faras kulturan ekskurson. Jam Aristotelo sciis pri tiu valora „emocipurigo", kiu tiel multe bonfaras al ni psikologie kaj eble eĉ morale.

Zamenhof jam en 1903 pripensis la valoron de esperanta dramprezentado: „Sed LA PLEJ EFIKA maniero de propagando estus, se oni povus aranĝi migrantan TEATRAN TRUPON Esperantan... ĉar nenia teoria parolado *pri* Esperanto povas tiel bonege efiki, kiel ludado de dramoj aŭ almenaŭ kantado *en* Esperanto." (*Leteroj,* vol. I, p. 47.) Tiuj, kiuj vidis bonajn prezentadojn ĉe Kongresoj (ekzemple: *La Homa Voĉo; La Respektinda P...; Kataki-Malamiko; Reaperantoj; La Leono*) ja scias pri la emocia efiko, la prestiĝo kaj la kultura valoro de tiaj noblaj spektakloj. Ni havas almenaŭ kelkajn bonegajn geaktorojn. Ni havas bonegajn tradukojn de multaj dramoj, ofte eĉ majstroverkojn de traduka arto, ekz. la Ŝekspir-tradukojn de Kalocsay kaj de Rossetti, la Sartre- kaj Pagnol-tradukojn de Bernard, la Sofoklo-tradukojn de Gregor. Sed kie estas la originala esperanta dram-arto?

Kredeble nia sola plurakta dramo, kiun oni povus plenserioze konsideri kiel maturan artverkon, estas *Sonĝe sub Pomarbo.* Ekzistas aliaj ne sen merito, ekz. *Jozefo* de Applebaum, *Ivan VI* de Mattos; *Ginevra* de *Privat* estas valora ĉefverko de pli frua epoko; sed eĉ kvar migraj birdoj ne aŭguras printempon preta. Nur la dramo de Baghy montras ian veran originalecon kaj abundan kreopovon; kaj eĉ li ne estis ankoraŭ nia Sofoklo.

Ni havas iom pli da prezentindaj unuaktaĵoj, inter kiuj, laŭ mia opinio, tute elstaras *Kvazaŭ Birdo Konstruas* de Auld; la unuaktaĵoj de Baghy estas ankaŭ legindaj kaj prezentindaj. Mi mem tre deziris verki vere bonan esperantan dramon, sed — ĉies vivo enhavas multajn neplenumitajn dezirojn; el miaj pli ol dudek drametoj, eble du-tri havas ian literaturan valoron, kaj tion marĝenan.

Ni havas ja multajn skeĉojn kaj etajn dialogojn, kaj espereble ricevos multajn pli; sed ni ne konfuzu ilin kun literaturo; ilia celo kaj valoro estas pedagogiaj. Estas meritplene, verki leg-ekzercojn kaj amuzaĵojn por klasoj, kursoj, konferencoj; lingvoinstruado konstante bezonas tiaĵojn; sed ju pli ni celas krei facilan legmaterialon des pli ni ne povas samtempe krei artverkon. Estas ankaŭ tre malfacile verki aktualan propagandan verkon, kiu estus ankaŭ artverko vera — la necesaj trosimpligoj falsas la densan multopecon de la vivrealoj; kaj eĉ sen ideologia lenso, la koncentriĝo de unuaktaĵo preskaŭ trudas trosimpligon. (Eĉ en la riĉega angla literaturo, ĉu oni povas taksi pli ol ses aŭ dek unuaktaĵojn vere kiel altnivelajn artverkojn?)

En Esperanto ni ĝis nun atingis relativan maturecon en poezio kaj en la novelo, kaj ni havas kelkajn bonajn romanojn. Kial nia dramarto restas tiel mizera?

Parte pro krudaj ekonomiaj faktoroj. Ĉiu serioza esperanta verkisto faras grandan oferon, ĉar per nacilingva verkado li povas almenaŭ ion enspezi. Kaj, se vi ne estas verkisto sufiĉe profesieca, por iom esperi sukceson, se vi volus verki nacilingve, bonvolu ne aldoni viajn fuŝaĵojn al Esperanto! sed foriru, kaj meditu pri kriterioj! Per Esperanto oni ne enspezas. Kaj multaj, kiuj trovas tempon por verki tute bonan lirikon, aŭ skeĉon, eĉ novelon aŭ unuaktaĵon simplan, vere ne disponas tempon por krei pluraktan dramon serioze konceptitan, ĉiudetale artisman kaj ĝis brilo poluritan. La verkisto ne nur ne ricevos pagon; estas tre dube, ĉu li trovos eblon, ke lia granda verko prezentiĝu aŭ eldoniĝu.

Oni eble diros, ke vera artisto verkas por nur arto, dediĉas sin al ĝi sen intereso pri rekompencoj. Jes! Sed ne senlime; eĉ vera artisto havas veran stomakon kaj ofte havas ankaŭ tute solidajn infanojn kun realaj gapantaj buŝoj; eĉ por artisto, tempo signifas monon; kaj, se li oferas eblojn de enspezo, li tamen ne volas verki por la vakaj interstelaj spacoj; se neniu prezentos aŭ eldonos la majstran dramon — nu, fakte, kiom ĝi utilos?

Simila premo malhelpas tiun, kiu volas verki seriozajn esperantajn romanojn. Ankaŭ, kompreneble, multaj homoj kapablas krei tute bonan malgrandskalan verkon sed ne havas tiun plusan kvazaŭ arkitekturan kapablon, organizi grandskalan verkon; aŭ eĉ simple ne havas la necesan krean energion kaj persiston. De la plej bela kolibro, kies movoj estas siaspece perfektaj, ni ne postulu aglan flugon.

Tamen, la problemoj de altnivela grandskala dramo inkluzivas plusan problemon; nur la dramo estas literatura speco ne tute sendependa, en kiu la aŭtoro estas, iasence, ne memsufiĉa. Kiel mi iam skribis en mia angla verko, *The Anatomy of Drama* (Routledge, Londono, 1960) — „Vera dramo estas tridimensia; ĝi estas literaturaĵo, kiu piediras kaj parolas antaŭ niaj okuloj." Kvankam oni povas kun plezuro legi dramon, oni ne plene spertas ĝin, ĝis oni vidas ĝin prezentita.

Prezentado igas la dramon pli vivanta, ofte klarigas aŭ emfazas ion, kion la nura teksto pale sugestas, kaj intensigas la emocian reagon. (Mi iam vidis mian komedion *Drasta Kuracado* tre bone prezentitan — en IFEF-kongreso en Stoke-on-Trent — de profesiaj geaktoroj. Nenie ili distordis mian intencon aŭ aldonis novan ideon; sed mi mem estis ravita; tiu komedio, tute sen literatura valoro, ŝajnis sur la scenejo preskaŭ bona!) Ankaŭ, malbona prezentado povas tute detrui la verkon — ekzemple, kiam iu aktoro ne bone parkeris sian rolon, aŭ parolas neaŭdeble; aŭ prezentado povas distordi la intencon de la aŭtoro, ekzemple per miskomprenoj, netaŭga tendenco, grandaj mallongigoj aŭ cenzuraj forstrekoj, aŭ interpretado malbonguste kaj arogante avangarda.

La serioza dramverkisto ne nur iasence dependas de reĝisoroj kaj aktoroj; li devas ekde la komenco pensi pri ili, kaj ankaŭ pri aŭdantaro. Verŝajne granda faktoro en la elstara relativa merito de la dramoj kaj dialogoj de Baghy estis, ke li estis profesia aktoro kaj reĝisoro, kiu komprenis la eblojn, efikojn, kaj teknikojn de la teatro. Dramverkisto devas almenaŭ viziti teatrojn; se eble, iom reĝisori. (Tamen recenzistoj povus fari same; jam dufoje recenzistoj informis min pri la neeblo prezenti ion, kion mi jam vidis sur la scenejo.) Li devas pensi pri pozicioj, movoj, multaj praktikaj eblecoj. Esperanta dramverkisto ankaŭ devas memori, ke li ankoraŭ ne povas esperi pri granda rolantaro; ni malofte disponas tian personaron.

La arto de dramverkisto estas arto, en kiu li ne povas kiel romantisto aŭ eĉ poeto, priskribi. Personecoj, situacioj, emocioj devas montriĝi per dialogo kaj videblaj agoj. Plue, aŭdantaro devas tuj kompreni; ĝi ne povas rerigardi la paĝon; kaj oni devas tuj kapti kaj ĝis la fino teni la atenton de aŭdantaro; tiuj homoj ne povas demeti la prezentadon kaj repreni ĝin post alia okupo. Necesajn informojn oni devas doni per konversacioj, tial tre koncize. Striktaj tempolimoj ankaŭ postulas grandan koncentriĝon. Dramo estas esence tre intensa artoformo, kaj samtempe ne povas fonti tute el privataj emocioj. Kiam ĝi havas seriozan artan kvaliton, ĝi estas multrilate la plej malfacila literatura speco; kaj kredeble eĉ nura krimodramo aŭ malpeza komedio postulas pli da teknika lerteco ol aliaj distraj verkoj. Ne mirinde, ke ni ne havas multajn bonajn dramojn. Fakte, ankaŭ en la ampleksa angla literaturo valoraj dramoj multe malpli ol valoraj poemoj aŭ romanoj abundas; eble same alilande.

Kiel plibonigi nian esperantan dramarton? Nu, varbi pli da esperantistoj kaj instigi en ili kulturamon, ĉar kiam ni havos sufiĉe grandan legantaron, eldonado iĝos profita kaj niaj aŭtoroj povos ricevi pagon. Estas vere, ne nur ke tempo estas mono, sed ke mono povas aĉeti tempon. Laŭtlegi kaj prezenti dramojn, kiam eble; tiel ni stimulos intereson kaj instruos teknikojn.

Andrzej Tomecki, fama pola aktoro

Ni ne povas laŭvole kreskigi geniulojn. (Estus bone, se ni povus kapti por Esperanto bonan dramverkiston nacilingvan — li eble provus doni ankaŭ al ni grandan verkon!) Ni povas nur esperi pri geniuloj, kaj kuraĝigi promeshavajn talentojn. Ni povas nur disĵeti verdan semon kaj plibonigi la teron.

Jes, tiu artformo estas malfacila. Al tiu, kiu, legante miajn dramojn, ne nur rimarkos iliajn mankojn, sed diros, „Nu, mi mem povus pli bone ol ŝi verki dramon!" mi diras: „Faru, nepre faru, do! ĉar tiel vi tre bone servos nian esperantan kulturon!"

Endre Tóth:

Kristnaska saluto

Radioludo

Ĉiuj kantas kune kanton kristnaskan, dum ties mallaŭtiĝo la Parolanto prezentas la personojn:

Parolanto: Rolas *Panjo,* ĉ. 60-jara, energia sed iom bigota. *Bea,* ŝia filino ĉ. 20-jara. Denizo, alie *Duduŝ,* ŝia filo 30-jara, iom ebria. *Teodoro,* ŝia alia filo kun voĉo nervoza, trema.

(La kantado plilaŭtiĝas, finiĝas. Poste:)

Pluraj (samtempe, voĉkonfuze): Kiel belega... dankon, dankon ... Jen kio! Kaj precize bonsida... De kie vi sciis, ke ĝuste ĉi tion?... De jaroj mi deziris jam tian... Neniam mi havis eblon por... Kiel vi do divenis, Teoĉjo?... Se venos neĝado, ni glitos per ĝi terure plaĉe...

Panjo (kun voĉo apartiĝinta): Infanoj, vi karaj, kial do tiom malŝpari, tion vi ne devus, kostis monstre da mono, Duduŝ, estingu la kandelojn, ili ekbruligos la branĉojn, kaj se eble, ne renversu la arbon sur vin, vi trinkis ŝajne pli multe ol... Atentu iom, ja rostiĝas dume la viando; antaŭ ol manĝi, ni povus fari la bendon por Julĉjo.

(Teodoro ŝaltadas la magnetofonon, murmuras, blasfemas. Zumo.)

Duduŝ: Mi pensas, ke la kafo elfluas.

Bea: Kio do? Ne. Ekstere aŭto.

Panjo: ... do, ni enŝaltos la magnetofonon kaj ĉiuj enparolos por Julĉjo, kvazaŭ li estus inter ni sub la kristnaska arbo...

Denizo: Bone. Sed antaŭe, fratinjo, vi ricevos de mi kiseton por la belega ŝalo, nu, nature, nur tiam, se vi promesos, ke vi ne edzigos al vi tiun aĉan ulon, ĉar se tamen, tiam manpremoj, kisetoj frataj kaj similaĵoj estos absolute preterlasataj. Ĉu klare?

Bea: Lasu min tranvila, bonvole. Neniom vin koncernas, kiun mi prenos kiel edzon. *(Mallaŭte:)* Sed, senŝerce, Denizo, ni provu toleri unu la alian almenaŭ ĉi-vespere. Pro Panjo. Prefere drinku, se nepre necesas.

Panjo: Atentu! *(Ŝi aplaŭdas)* Teoĉjo, vi povas ĝin ekirigi... ho jen, mi forgesis diri, ke ne necesas nepre diri al Julĉjo, ke Teodoro eksedziĝas, nek tiujn aferojn...

Teodoro (iom ironie): Ja ne! Ĉar tio estas tiktikla.

Panjo: Nu, fileto, se vi volas scii mian opinion, tio estas ege tik-tikla. Tre domaĝe, kaj ne tre feliĉige al mi, ke...

Teodoro: Sed panjo, ankaŭ mi diras ja tion saman. Precize tion. Absolute tik-tikla. Komplete tiktikla. Kiu volus disputi kun vi, panjo kara? Kaj kiu insistus disheroldi tion?

Panjo: Enŝaltu ĝin, fileto. *(Post enŝalto:)* Julĉjo kara, dolĉa mia Buboĉjo...

Denizo (interrompe:) Nu, vi estas nuraj idiotoj. Mi atendas soif-agonie la kafon, kvazaŭ la naskiĝon de Mesio, kaj vi ne enigis la ŝtopilon en la konektilon. Azenoj!

Panjo: Volu elekti viajn vortojn. Mi mem forgesis konekti la kafmaŝinon. Mi rifuzas aŭdi tian tonon inpertimentan.

Bea: Lasu lin, panjo. Certe min li celis.

Panjo (ree parolas surbendige): Karega Julĉjo, mia Buboĉjo, via panjo parolas, jen ni sidas ĉiuj kune en Kristnaska vespero, sub la belege ornamita arbo, la tuta familio, nur vi mankas kaj la kompatinda onjo Annjo, ĉar rompiĝis al ŝi la kruro. Marde elvojaĝos Emeriko, li portos al vi ĉi tiun bendon, Buboĉjo. Tre doloras, ke nin disigas multaj miloj da kilometroj, tamen ni sentas, kvazaŭ vi estus inter ni en ĉi tiuj feliĉaj horoj. Ĉe ni nenio nova, krom ke Bea edziniĝos, eventuale printempe...

Bea: Stop! Tio ne estas necesa. Mi ne amas roli en areno. Mi petas tute ne paroli pri tio.

Ili retroturnas la bendon. Nun aŭdiĝas la voĉo de Panjo el la aparato: ... vi estus inter ni en ĉi tiuj feliĉaj horoj... *Sekvas transŝalto, poste.*

Panjo (propravoĉe): Ni ĉiuj fartas bone, nur la kompatinda onjo Annjo, imagu, rompiĝis al ŝi la kruro, ŝi falis sur la glita trotuaro. Terure!...

Teodoro: Ĉi tion panjo jam diris unufoje.

Panjo: Silenton! Impertinenta vi estas, fileto! Ni haltu.

Post retroturnado de la bendo, Panjo el la aparato: Terure!

Panjo (propravoĉe por surbendigo): Do gardu vin, dolĉa Julĉjo, mi ne parolos plu, sed transdonas la parolon vice al la aliaj, fine ni legos ion el la Sankta Skribo *(elŝalto).* Bea, venu, daŭrigu.

Bea: Ĉu nepre mi devas...

Panjo: Temas ne pri devo sed pri deco.

Bea: Vi scias ja bone, Panjo, ke Julio kaj mi...

Panjo: Kara filnjo, ne diru azenaĵojn, nur kelkaj vortoj, kelkaj afablaj vortoj, je la festo de amo, jes ja, vi nepre devas.

Bea (enŝaltas): Nu do, Julio, do ĉao, unue, mi estas Bea, mi volas diri, ke, ĉar estas kristnasko... do, kiel diri, ne koleru, ke tiam mi ne eliris al la flughaveno, tiam mi vin tre abomenis. Nun jam egale, kaj se vi pensas tiel same, ni forgesu pri la tuto. Diablo ĝin prenu. Ĉao. Mi transdo... Al kiu mi transdonu? *(Elŝalto.)*

Panjo: Sekvas Denizo. Duduŝ! Kie vi estas? Filnjo kara, iru, voku lin. Certe li serĉas vinon en la kuirejo. Teoĉjo, daŭrigu vi dume.

Teodoro (enŝaltas): Slut, Julio! Mi estas Teodoro. Jen ni estas ĉiuj, ni sidas kune, mankas nur vi kaj onjo Annjo, ĉar rompiĝis al ŝi la kruro.

Denizo (dume revenis, flustre): Goloj tri-nulo, avantaĝe al onjo Annjo.

Teodoro: Ni tre sentas vian mankon, Julĉjo, venu hejmen kiel eble plej baldaŭ, kaj nur finu sukcese vian laboron, kaj ankaŭ dume skribu. Ni vin kisas *(elŝalto).* Kiu sekvas?

Panjo: Denizo, diru, ĉu vi ne hontas, fileto, apenaŭ vi kapablas stari sur la piedoj. Metu al li pli proksimen tiun...

Denizo (enŝaltas): Do, ĉao, olda knabo, ĉi tie parolas Denizo, aŭ Duduŝ, la nedezirata estas forstrekenda, he-he, ĉi tio estis spritaĵo. Kiel vi fartas tie en la malproksima fremdo? Ni statas ieletiele en la olda patrujo, ni festas la kristnaskon en trankvilo, sed la vino, domaĝe jam elĉerpiĝis, kial tion nei?

Panjo (kolerete): Sed Denizo!

Denizo: Do, mallonge, ni ĝin jam fortrinkis, ĝi estis tilifolia el Debrő. Nu, nur tiom volis diri. Ni vin salutas ame, deziras ankaŭ al vi kristnaskan arbon ĝisplafonan kaj ĉion. Jes, nun venas al mi en la kapon, ĉiu tie ĉe vi entute ekzistas pin-arbo? Tie estas iaj palmoj kaj similaj kretenaĵoj... Nu, egale... Nun mi ekpensas, ke tie trans la ekvatoro vi nun havas julion, ĉu ne? Pli ĝuste, decembron, sed someron. Groteska, ĉu ne, tio devas esti...

Panjo: Nu, jam sufiĉe, ne klaĉu tiom multe. Ni volas ankaŭ el la Sankta Skribo...

Denizo: Bone. Nu, ne estas multo nova, nur tiom, ke, imagu, al la povra onjo Annjo la kruro rompiĝis. Terure, ĉu ne? Krak, kaj rompiĝis...

Panjo: Denizo! Sufiĉe jam stultadi! Al mi la mikrofonon! *(Enŝaltas)* Julĉjo, karulo, ree via patrino parolas., por diri nur, ke pro vi ni ĉiuj maltrankvilas, gardu vin, fileto. Se la klimaton vi ne bone eltenas, prefere petu vian revenigon pli fruan. Ĉar, kredu, nenio tiel gravas kiel la sano. Ne koleru tiun ŝafkapan Denizon. Ili nun ĉiuj estas streĉitaj pro la festo kaj ĝojas unu pri la alia, ne koleru, kara Buboĉjo. Ni atendas ankoraŭ Elinjon kaj vian grandan filon, ili venos certe...

Teodoro (interrompe): Kial diri tion, panjo, vi scias ja, ke ili ne venos.

Denizo: Mi aŭdas la kafon, mi aŭdas la kafon!

Bea: Diosinjoro! Kiu estis tiu mizerulo, kiu enŝaltis la elektron kaj ne metis vazon sub la kaf-elfuilon. Rigardu, naĝas la tuta ĉambro!

Panjo: Denizo. Ve, fileto, kion fari pri la tapiŝo? Kuru, enportu viŝoĉifonon, forviŝu ĝin, unu, du! Filnjo, preparu alian kafon. Porkoj vi estas, vere.

Denizo: Mi mortas ĉi tie sen kafo, kaj tiam ankoraŭ mi...

Bea: Panjo, ni lasu Elinjon, piku ŝin pigo. Ili aranĝos la aferon mem, ŝi kaj Julio. Tiaĵon oni ne povas altrudi.

Panjo: Stranga vi estas. Ĉu mi altrudas? Mi nur volus... Vere stranga vi estas...

Teodoro: Mi enŝaltas, panjo, parolu plu. Sed pri Elinjo plu ne teksu-miksu.

Panjo: Kiel do mi ne teksu-miksu? Bonvolu elekti viajn esprimojn.

Teodoro: Bone, en ordo. Mi enŝaltas.

Panjo: Do nun aŭskultu kune la Skribon, kvazaŭ ni estus kune. Vi estas nun la plej aĝa viro en la familio, vi devus legi el la Skribo, sed ĉar ni ne povas esti inter ni, Denizo vin anstataŭos *(elŝalto).* Venu, Duduŝ. Kie la teksto? Elserĉu ĝin por li.

Denizo (legas malcerte kun intermitoj): Kaj en tiu tagoj... eliris dekreto de Cezaro Aŭgusto, ke la tuta mondo estu... registrado, kiam en Kirini... Kirenio estis reganto en Sirenio, Sirio, kio do, mi ne komprenas...

Panjo; Stop, stop! Hontu, fileto. Jes, hontu! Teodoro legu!

Denizo: Panjo, ĝi estas tiom etlitera, sed vere, ne tio, ke mi drinkis, kie tiu alia Biblio, tiu ilustrita kun bildo pri Jozefo kaj Putifar-edzino, tio estas bona, sed kie ĝi estas, ĉi tiuj uloj ĝin vendis al oldlibristo...

Panjo: Da vi mi havas sufiĉe, fileto. Teodoro ĝin legu.

Teodoro (malvolonte, incitite): ...kaj ŝi naskis sian unuan filon kaj ĉirkaŭvindis lin kaj kuŝigis lin en staltrogon... *(elŝalto).* Panjo, ĉio ĉi por mi estas ege peniga. Permesu, ke mi ne devu nun ĉi tiun cirkon... da tio mi havas jam sufiĉe hodiaŭ. Tiel mi deziris ĉi tiun tutan kristnaskon kiel ĝibon sur la dorson. Hodiaŭ mi laboris, morgaŭ mi deĵoros, nun mi devos reporti ankaŭ ĉi putran magnetofonon... ni manĝu rapide ion, poste mi malaperos en la vakuon, ni lasu nun la Skribon...

Panjo: Teoĉjo, Teoĉjo! *(Silento, bendovolvado)*

Teodoro (tute apatie): Kaj la anĝelo diris al ili: ne timu; ĉar jen mi venigas hodiaŭ al vi bonan sciigon, ĉar hodiaŭ estas naskita por vi, en la urbo de David, Savanto, kiu estas Kristo, la Sinjoro. Kaj jen la signo por vi: vi trovos infaneton, ĉirkaŭvinditan kaj kuŝantan en staltrogo. Kaj subite estis kun la anĝelo amaso de la ĉiela armeo, laŭdante

Dion kaj dirante: Gloro al Dio en la supera alto, kaj sur la tero paco, inter homoj Di-favoro.

Denizo: Punkto. Tiom la tuto!

Panjo: Kaj nun ni kantu, infanoj miaj.

Ĉiuj komune kantas ian kristnaskan kanton. Poste:

Denizo: Nu jen, dume ankaŭ elfluis la kafo. Nun iu el la pli sobraj eltiru la konekto-ŝtopilon, ĉar brulos la gumo kaj estos eĉ pli malbonodore. Infanoj, ĝis kiam estas malfermita la stratangula kiel-ĝinoni-nomas?

Panjo: Restu sur via postaĵo! Hontu! Nenien vi iros.

Denizo: Bone, mi nur volis porti ion al ĉi tiuj. Kial tuj vekriadi?

Panjo: Fari tiaĵon en Sankta Vespero! Vi estas mise sentaktaj, jes, sentaktaj! Julĉjo neniam farus al mi tion. Li neniam!

Teodoro: Ni lasu nun, kion Julio faris kaj kion ne! Estas malfrue. Ĉu vi volas ĝin reaŭskulti? *(Bendovolvado.)*

Panjo: Do sentakta al mi neniam li estis. Neniam min ofendis kiel vi. Cinika? Ne, li tute ne estis tia.

Eksonas la surbendigita teksto, sed la aparato misfunkcias. Pro tio, ĉe la surbendigo, la bendo ŝajne haltadis ree kaj ree, kaj granda parto de la teksto mankas, aŭ anstataŭ ĝi aŭdiĝas nur kvikado-pepado:

Magnetofono: Karega Julĉjo, mia Buboĉjo, via panjo parolas, jen ni sidas ĉiuj... *(pepado)*... belege ornamita arbo *(pepado)*... kompatinda onjo Annjo, ĉar rompiĝis al ŝi la kruro *(pepado)*... multaj miloj da kilometroj... *(pepado)*... Nu do, Julio, do ĉao, kiel vi fartas?... *(pepado)*... mi estas Bea ... *(pepado)*... tiam mi vin tre abomenis... diablo ĝin prenu... Slut Julio. Mi estas Teodoro... ni estas ĉiuj kune... onjo Annjo, rompiĝis al ŝi la kruro ... vian mankon... finu sukcese... kisas... do ĉao, olda knabo... Duduŝ... he-he... spritaĵo... kiel vi fartas... iele tiele... la vino domaĝe jam elĉerpiĝis... kial tion nei... deziras al vi... ĝisplafonan... venas al mi en la kapon... kretenaĵoj... julio... decembro... somero... imagu, al la povra onjo Annjo la kruro rompiĝis... Julĉjo karulo, ree via patrino... gardu... la klimaton... ŝafkapa... do nun aŭskultu la Skribon... plej aĝa filo... Denizo anstataŭos... kaj en tiuj tagoj... Kirini... Kirenio... reganto en Sirenio, Sirio, kio do, mi ne komprenas... stop... kaj ŝi naskis sian unuan filon... kuŝigis lin en stal-trogon... kaj la anĝelo diris... ne timu... bonan sciigon... en la urbo de David... vi trovos... infaneton en staltrogo... amaso... laŭdante... kaj sur la tero paco, inter la homoj Di-favoro... punkto... tiom la tuto.

Sekvas la kantado, sed la baterioj ŝajne estas elĉerpiĝantaj, tial anstataŭ la melodio nur basvoĉa miaŭado aŭdiĝas pli kaj pli mallaŭtiĝante...

Dum Via vojaĝo en Hungario certigas Vian komforton

EN STACIDOMOJ
restoracio, bufedo, nutraĵpavilono

EN TRAJNOJ
litvagono, restoracivagono, bufedvagono

EN ŜIPOJ
restoracio, bufedo

EN LONGDISTANCAJ AŬTOBUSOJ
bufedo

UTASELLÁTÓ

Favorpreze certigas la manĝigadon de turistaj grupoj la Pasaĝerproviza Entrepreno. Informojn donas kaj laŭdezire skribitan informon sendas la Pasaĝerproviza Entrepreno, Budapest, V., Veres Pálné u. 24. Telefon: 189-900/160

GYULA ILLYÉS

EN LA FLAVA DOMO

Napoleonon vidis mi ploregi,
kaj vidis en sak-vest' Jesuon-Reĝon,
lin priridegi la vivantan Budhon,
kiu gratadis dume sian feĉon.
Mi vidis trudkitelan rikanulon
kies vizaĝo-tikoj senkompate
surfrapis min per tio, kion frapi
sur min ne eblis al li pugnobate.
Mi vidis sur kvar monstraj koridoroj
tiujn falintojn plu ne pacotrovajn,
kiuj la vivon plu kun sobra menso
konduki jam neniam estos povaj.
Ho, mi imagis tiun bonapartan,
jesuan doloregon, kiu jugis
vin, fratoj: la pezegon, de kiu vi
falegis al la ter' kaj suprenflugis.
Sed poste kaptis min envio: tamen,
vi, kiel ajn, forĵetis ĉi balaston;
l'anim' ribela, kiel ajn, sed fine
sin liberigis en senbaran vaston.
Sed jen mi, ĝin portanta sobramense!
Kiu do scias, kiom ĝi turmentas,
katenas, premas, ve, kaj tentas, kiam
al ĉiu ajn la manon mi prezentas?
Malsanas mia kor', stomako, nervoj,
neŝanceleblas — mia cerbo nura;
kien mi fermis min mem, ve, ne estas
alia Flava Dom' tiel terura.

Tr. György SZONDI

Gyula Illyés estis distingita per la franca Ordeno de Artoj kaj Literaturo, per ties plej alta grado „komandoro". La ordenon fondis André Malraux en 1957 por distingi tiujn, kiuj kreis ion elstaran en la arto aŭ literaturo kaj kiuj atribuis al la plivastiĝo de la renomo de l' franca spirito. Gyula Illyés faris multe por tio per sia ampleksa tradukartista laborado, kaj per siaj verkaĵoj. La ordenon transdonis la Budapeŝta ambasadoro de la Franca Respubliko, Gérard Amanrich, je la 3-a de julio.

Novaĵoj pri nia redaktistaro

Du anoj de nia redaktoraro: Aurél Ponori Thewrewk astronomo kaj D-ro Lajos Lesznai muzikhistoriisto faris valorajn prelegojn dum la 12-a Somera Esperanto-Universitato en Gyula. Ambaŭ prelegojn la ĉeestantoj kun granda aplaŭdo rekompencis.

En la monato julio Aurél Ponori Thewrewk malfermis en la Teatra Salono la sciencan sesion organizitan de la Scienca Rondo de la Klubo Konkordo en Budapest. Ponori la prezidanto emfazis, ke en la epoko de scienca kaj teknika revolucio necesas uzi Esperanton ankaŭ por sciencaj verkoj, prelegoj.

Inter la kvin prelegoj d-ro Lajos Lesznai kandidato de la muzikaj sciencoj prelegis pri reprikaj strukturoj en la hungaraj popolkantoj. Por komentarii la strukturojn, helpe de magnetofono li eksonigis interesajn popolkantojn. Ni deziras pluajn sukcesojn al niaj entuziasmaj kunredaktoroj.

SZ. — B.



Renkonto — desegnaĵo de Pál Barczi

Hungardevenaj vortoj en Eŭropaj lingvoj

La hungara lingvo, apartenanta al la finno-ugra lingvo-familio, transprenis multajn vortojn el la lingvo de la popoloj, kun kiuj ĝi kontaktiĝis; tiujn listigi bezonus libron. Multe malpli da vortoj hungardevenaj eniris en la lingvojn Eŭropajn.

En PIV estas troveblaj la vortoj: *ĉako, ĉardo, ĉardaso, gulaŝo, husaro, koĉero, papriko* — ĉi tiujn ĉiu hungaro rekonas kiel sialingvajn. Tamen, ili ne ĉiam estas hungar-originaj: *ĉardo* devenas el la persa kaj ĝin peris al la hungara la osmanturkoj, *husaro* originas en la bizanc-turka *chosarios, papriko* devenas el la novgreka *piperi* kaj la slavoj al ili donis la formon *paprika.* Sed *koĉero (kaleŝisto)* estas pure hungar-origina: devenas el la nomo de hungara viláĝo *Kocs* (pr. Koĉ). Tiuloke oni eltrovis en la 15-a jarcento la veturilon, kiu ne skuadis la veturanton, ĉar ĝia veturant-loko estis pendigita sur rimenoj. Oni nomis ĝin, poste mondfaman, „kocsi szekér" (Koĉ-a veturilo) kaj fine simple *kocsi* (pr. koĉi). De tiu vorto venis G. *Kutsche, Kutscher,* A. *coachman,* I. *cocchio,* F. *cocher,* H. *cochero,* R. *kuĉer* kaj Z. *koĉero.* Kaj la vorto eĉ iris sur la ĉielon: *Koĉero* estas stelkonstelacio (Auriga).

P. Balkányi

Intervjuo kun Sándor Gáspár, ĉefsekretario de la Landa Konsilio de la Sindikatoj

Kiel la internacia sindikata movado povus utiligi la internacian lingvon? Por ke diverslingvaj laboristoj povu interkompreniĝi

La aferon de la internacia lingvo ligas profunda idea parenceco al la internaciismo de la laborista movado. Dank' al tio, la Hungara Esperanto-Asocio, ekzemple, jam delonge agadas sub la patronado de la sindikatoj. Kaj tutmonde ŝajnas plifortiĝi la klopodo, ke la sindikatoj subtenu nian aferon pli forte ol ĝisnune, antaŭ ĉio per la akcelo de la instruado de E-o, poste per ties fakta utiligo en la sindikata movado, en la internaciaj rilatoj de la laboristoj.

...kaj por ĉiu apertiĝu la mondo

Tiu ĉi penso aperis jam ankaŭ pli frue. Ĝin lanĉis sindikataj gvidantoj de pluraj landoj en tiu spirito, en kiu Barbusse, la granda franca verkisto diris: „Ni, socialistoj devas kapti ambaŭmane la mirindan ŝlosilon, kiu apertas por ĉiu la tutan mondon. Tiu ŝlosilo estas Esperanto." De tiam multaj laboristoj „kaptis" tiun ŝlosilon, sed ankoraŭ mankis eblo por universala sindikata iniciato. En la pasintaj jardekoj signife plidensiĝis la internaciaj rilatoj de la sindikatoj, la instigo de Barbusse do estas pli aktuala ol iam. Tial H.V. kaj la hungarlingva Eszperantó Magazin petis intervjuon de Sándor Gáspár, membro de la Politika Komitato de la Hung. Socialisma Laborista Partio, ĉefsekretario de la Landa Konsilio de la Sindikatoj kaj gvidanta persono en la internacia sindikata movado. Unue ni demandis lin:

Por la reciproka interkoniĝo

— Kiel vi vidas la lingvajn malfacilaĵojn en la sindikata mondmovado kaj interne de ĝi en la hungaraj sindikatoj?

— La hungara sindikata movado havas tre vastajn internaciajn interrilatojn kun la landaj pintorganizaĵoj kaj ankaŭ kun iliaj metiaj, uzinaj organizaĵoj — komencis sian respondon Sándor Gáspár.

— Tiuj interrilatoj pli kaj pli intensiĝas. La sindikatojn de la socialismaj landoj interesas inter aliaj la metodoj de nia agado. Kun vigla atento observadas nian movadon ankaŭ la sindikatoj de la kapitalismaj landoj, eĉ pli la tieaj laboristoj; ĉi tiuj, ĉe renkontoj kaj aliaj kontaktiĝoj, deziras informiĝi pri tio, kiel ni solvis multajn problemojn ĉe ili ekzistantajn. La sindikatojn de la evoluantaj landoj interesas precipe tio, kian lokon kaj rolon en la socio havas la hungaraj sindikatoj kaj kiajn rezultojn ili atingis en la socialisma konstruado.

— Tia atento nin honoras kaj ni klopodas kontentigi la interesiĝon en la signo de la internacia laborista solidareco. La sindikatanoj, postenuloj, delegitoj estas ĉe ni ĝoje akceptitaj gastoj. Ni provizas ilin ankaŭ per niaj fremdlingvaj sindikataj eldonaĵoj. Niaj personaj interparoloj, traktadoj okazas helpe de interpretistoj; tio, kompreneble malfaciligas en certa mezuro la reciprokan komprenon, ekzistas do lingva problemo.

— Niaj sindikataj gvidantoj kaj aktivuloj kaj ankaŭ niaj membroj iradas en la mondo diversloke, kaj akiras spertojn pri la laboro kaj bataloj de la eksterlandaj sindikatoj. Tial ankaŭ kun la sindikatoj de la kapitalismaj landoj ni deziras evoluigi la interrilatojn. Mi esperas kaj opinias verŝajna, ke en la futuro tiuj interrilatoj estos pli kaj pli multflankaj, kaj krom la kulturaj, sportaj kaj aliaj terenoj ili etendiĝos al multaj gravaj problemoj de la movado.

— Estas evidente, ke la lingva izoliteco efikas malhelpe al la internaciaj interrilatoj. Estus do bone malpliigi la lingvajn malfacilaĵojn, por ke pli bone ni ekkonu kaj komprenu unuj la aliajn. Niaj celoj kaj taskoj estas ja de komuna intereso. Tial ni salutas kaj laŭ niaj ebloj ankaŭ subtenas Esperanton, kiu servas la pliintensigon de la internaciaj rilatoj, kaj ni subtenas ankaŭ la E-movadon.

— Laŭ mia opinio Esperanto povus havi signifan rolon en la pli bona konigo de la vivo kaj sindikata movado de la diverslingvaj laboristoj. Ĝi povus grave helpi en tio, ke la lingvoproblemo estu malpli embarasa kaj fine estu solvita. Ĉi tio ĉiamaniere estas intereso de ĉiuj sindikatoj de la mondo, pri kia-ajn-landa sindikata movado temas.

Ni kunlaboras por la disvastigo de Esperanto

— Ni ĝojas, ke kamarado Gáspár tiel pritaksas E-on. Tial mi parolus ankaŭ pri aliaj lingvaj problemoj sindikato-koncernaj. Plilarĝiĝis la internacia laborista turismo kaj la internaciaj feriaj ŝanĝ-ripozigoj, organizataj de la sindikatoj. Kreskas la nombro ankaŭ de tiuj faklaboristoj, kiuj okaze de eksportaj mendoj aŭ kunlaboroj laboras eksterlande dum pli-malpli longa tempo. Ankoraŭ plinombraj estas la laboristoj kun ili laborantaj en la akceptantaj landoj. Por la laboristoj de la evoluantaj landoj tia kunlaboro signifas ankaŭ fakan aŭ perfektigan kurson. Sed oni ne povas starigi interpretiston apud ĉiun eksterlandan muntiston! Ĉu kamarado Gáspár ne pensas, ke la internacia sindikata movado devus okupiĝi ankaŭ pri ĉi tiu problemo? Kaj ĉu oni ne devus rekomendi al la laboristoj, laŭ internacia interkonsento de la sindikatoj, ĝuste la plej facilan lingvon, Esperanton? Kio estas via opinio pri ĉi tiu eblo?

— Kiel tutmonde, ankaŭ ĉe ni, unu el la noblaj celoj de la sindikata movado estas plilarĝigi la internaciajn rilatojn sur sindikata tereno, per sindikataj rimedoj. Ĉion, kio tion helpas — kaj mia konvinkiĝo estas, ke Esperanto tion helpas — ni subtenas laŭ niaj fortoj. Mi opinias preskaŭ certa, ke tiu propono, ke la sindikatoj helpu la lernon de Esperanto per internacia interkonsento kaj rekomendo, trovus aprobon ĉe la sindikatanoj kaj sindikata movado de multaj landoj kaj ankaŭ ĉe la internacia korporacio de la sindikatoj.

— Tial ni estas pretaj kunlabori kun tiuj sindikatoj, laŭ kiuj Esperanto plifaciligus la interproksimiĝon, interkompreniĝon de la diverslandaj sindikatoj kaj sindikatanoj. Por tio, en konvena tempo, sur la internaciaj forumoj de la sindikatoj ni ankaŭ proponus pridiskuti ĉi tiun gravan problemon, kaj, se ni atingos konsenton, fari ankaŭ rezolucion por la disvastigo de Esperanto inter la sindikatanoj-laboristoj.

Por plievoluigo de niaj interrilatoj

— Ĉi tiuj gravaj kaj esperigaj konstatoj de kamarado Gáspár do signifas, ke la Landa Konsilio de Sindikatoj turnus sin post la necesa preparado al la Sindikata Mondligo kun la propono, ke oni metu al tagordo ĉi tiun gravan internaciistan demandon?

— Jes. Mi pensas, ke la hungaraj sindikatoj, en konvena tempo, esprimus ĉe la Sindikata Mondligo, ke ili rigardas Esperanton kiel utilan lingvan helpon por reciproka interkoniĝo, por interŝanĝo de spertoj, por interproksimiĝo, por evoluigo de la interrilatoj. Tial ni proponus konvenan pritraktadon de la afero.

Estas nature, ke la sindikatoj kaj sindikataj ligoj havas suverenan rajton difini sian starpunkton. Kaj tiun rajton ni devas respekti.

Sándor Gáspár kun eksterlandaj gastoj
(Foto de László Székely)

Por ĉiu bona afero – preta diskuti

— La suverenaj rajtoj estas evidentaj. Sed dum ĉiu internacia pritraktado okazas diskutoj. Oni devus, niaopinie, ankaŭ diskuti kun la eventualaj kontraŭargumentoj. Ekzemple mencii — ĉar pruvi ne necesas — ke la grandega plimulto de la laboristoj-sindikatanoj de la mondo neniam, nenie lernos iun ajn fremdan nacian lingvon. Tamen granda parto el ili volonte lernus tian facilan lingvon kiel Esperanto, sed nur tiam, se internacia konsento de la sindikatoj garantius, ke en la landoj de la interkonsentintaj sindikatoj grandmezure kreskus la tendaro de la Esperanto-parolantoj, do plilarĝiĝus la multflanka utiligebleco de la lingvo.

— Por ĉiu bona afero ni estas pretaj diskuti sur ĉiu nivelo de niaj internaciaj renkontiĝoj. La situacio, fakte, estas tia, ke granda plimulto de laboristoj, aktivuloj kaj ĝenerale de la popoloj neniam alproprigos lingvon de iu ajn alia nacio. Ankaŭ tio

estas fakto, ke eĉ la sindikatestroj parolantaj unu aŭ du fremdajn lingvojn ofte bezonas interpretistojn, ĉar multaj el iliaj partneroj komprenas iun alian fremdan lingvon.

Iniciatu UEA – ni ĝin subtenos

— *Jen kies rekono kontribuis al tio, ke UEA en 1966 sin turnis al UNO kun internacia memorando aprobita el 74 landoj. Tiam, krom unu miliono da individuaj subskribintoj, inter ili multaj konataj politikistoj, scienculoj, artistoj, protektis la memorandon la gvidantaro de 3843 diversaj sociaj organizoj en la nomo de sume 71 milionoj da membroj. Kvankam ne atinginte sian celon, la memorando tamen estis signifa, precipe ĉar ĝin subskribis 25 grandaj naciaj kaj internaciaj sindikataj centroj de socialismaj kaj kapitalismaj landoj kun preskaŭ 25 milionoj da membroj, aprobante, ke E-on, kiel UNO-konvencian internacian lingvon devige oni instruigu en ĉiuj lernejoj de la mondo kaj progresive ĝin enkonduku sur ĉiu kampo de la internaciaj rilatoj. La plimulto de tiuj sindikatoj apartenas al la Internacia Ligo de Liberaj Sindikatoj. Ni opinias do, ke se laŭ hungara iniciato la Sindikata Mondligo farus decidon pozitivan, tiam oni povus komenci intertraktadon ankaŭ kun la Internacia Ligo de Liberaj Sindikatoj. Kiajn ŝancojn kamarado Gáspár vidas ĉi-koncerne?*

— Kompreneble, mi ĝojus, se en la Mondligo de Sindikatoj ni sukcesus en ĉi tiu demando kaj se la Mondligo de Sindikatoj povus pri ĝi sukcese intertrakti kun la Internacia Ligo de Liberaj Sindikatoj. Kelka dialogo jam komenciĝis inter ĉi tiuj du grandaj internaciaj ligoj. Precipe pro tio, ke la sindikatestroj en la kapitalismaj landoj pli kaj pli trovas necesa krei interrilatojn ankaŭ kun la sindikatoj de la socialismaj landoj.

— Ĉi tiun interproksimiĝon ni sincere salutas kaj, por la multflanka evoluigo de niaj interrilatoj, ni povus kunlabori ankaŭ en la larĝasfera disvastigo de Esperanto. Estus do dezirinde, ke ankaŭ la Mondligo de Sindikatoj kaj la Internacia Ligo de Liberaj Sindikatoj faru ĉi-koncerne interkonsenton. Tamen, mi pensas, ke antaŭe UEA povus iniciati ĉe la internaciaj sindikataj centroj, ke ili okupiĝu favore pri Esperanto. Kaj poste ni, hungaraj sindikatoj, pritraktinte la aferon ankaŭ kun la sindikatorganizaĵoj de aliaj landoj, povus akceli la sukceson de la iniciato. Depende de ĉi tio povus sekvi la unuecigo de la planoj kaj la difino de la praktikaj taskoj.

— *Mi opinias la vidpunkton de kamarado Gáspár tre reala. Fine, permesu ankoraŭ mallongan demandon. La „Népszava", la ĵurnalo de la hungaraj sindikatoj, en sia numero de 12-a majo publikigis artikolon, kiu konstatis interalie, ke la ellerno de Esperanto povus esti utila kultura engaĝiĝo, ag-ofero por la anoj de la socialismaj laborbrigadoj. Kion vi opinias pri tio?*

— Mi konsentas. Estas certe, ke anoj de socialismaj brigadoj, ellerninte Esperanton, jam per la lingvolernado pligrandigus sian kulturitecon kaj povus ligi amikajn, korespondajn rilatojn kun samfakaj brigadanoj de iu socialisma lando, lernantaj aŭ jam sciantaj Esperante. Per tio la internacia amikeco kaj la internaciismo fariĝus por ili kvazaŭ persona travivaĵo.

— *Ni dankas la grandsignifan deklaracion de kamarado Gáspár. Ni venigos ĝin al la naciaj kaj internaciaj asocioj de la E-movado kaj al ties ĉiuj gazetoj kaj radio-dissendejoj, por ke ili utiligu ĝin en la intereso de la grandioza internaciisma afero ĉe la sindikataj centroj de sia propra lando kaj sur ties forumoj internaciaj.*

— Pluajn sukcesojn mi deziras al via fervora laboro por la disvastigo de Esperanto — diris por fino Sándor Gáspár, ĉefsekretario de la Landa Konsilio de Sindikatoj.

Imre SZENES

Tr. *Tárkony*

Lernantoj! Komencantoj! Kursgvidantoj! Legu vian gazeton, la Internacian Lernejan Esperanto-Revuon

JUNA AMIKO

Aperas 3-foje jare (septembro, januaro, aprilo) Jarabono: 2,10 guld.

JUNA AMIKO *prezentas* diversajn popolojn, mondfamajn artistojn, scienculojn, unikajn produktojn de la homa menso, interesaĵojn el sciencoj kaj tekniko;

JUNA AMIKO *amuzas* per kantoj, ludoj, enigmoj, ŝercoj, rakontoj, fabeloj, versaĵoj;

JUNA AMIKO *informas* pri lernejaj grupoj, internaciaj kluboj, korespond-anoncoj, gravaj okazaĵoj;

JUNA AMIKO *organizas* konkursojn, kontaktojn inter lernejanoj.

JUNA AMIKO uzas 1000 vortradikojn, simplan vorto-kaj frazokonstruon.

JUNA AMIKO estas riĉe ilustrita per fotoj, desegnoj, karikaturoj.

Amplekso: 24 paĝoj. Preso: dukolora.
Eldonejo: Hungara Esperanto-Asocio.
Redakcio: 28 personoj el 17 landoj.
Legu! Abonu! Propagandu la plej utilan revuon de la komencantoj!

Festparolado de Béla Berczeli, ĉefsekretario de HEA

EĈ GUTO MALGRANDA...

Esperantistoj nenie en la tuta mondo bezonas kompletigon de ĉi-supra poemfragmento, ja eĉ sen tio ili bone scias, pri kio temas.

Vere, unu el la plej malfacilaj taskoj estas venki la homan indiferenton, eĉ se oni proponas ion evidente praktikan kaj avantaĝoriĉan. Ni devas tial konstante frapadi la „monton granitan" kaj pli kuraĝe elpaŝi el nia iel sektosimila magia rondo.

Tiaj meditadoj anticipis la aŭdacan paŝon de Hungara Esperanto-Asocio, kiam ĝi decidis transformi sian ĝisnunan oficialan informilon „Hungara Esperantisto" al gazeto, redaktata ĉefe en nacia lingvo kaj destinata unuavice por la hungara publiko. Ĝis septembro aperis jam sur la stratoj dekdu numeroj de la modern-aspekta nova gazeto *„Eszperantó Magazin"*, (redaktas Mihály Gergely) publikante la opiniojn de multaj renomaj verkistoj, redaktoroj, scienculoj, konataj eminentuloj de la publika vivo pri la problemoj de la internacia lingvo ĝenerale kaj pri Esperanto speciale. Fari saldon post unu jaro estas ankoraŭ tro frue, sed ni esperas, ke la rezulto realiĝos en altiĝo de nombro de la abonantoj, asociaj membroj kaj lingvo-kursanoj.

La samon celas la *hungarlingva almanako* de „Eszperantó Magazin". (Redaktis Vilmos Benczik.) Ĝi estas siaspece unikaĵo en Esperantujo. Tiu jarlibro, krom esti kalendaro por 1974, kun kaleidoskope bunta, alloga enhavo sur 240 paĝoj, proksimiĝas propagandcele al la publiko. Ĝi estas taŭga por resti populara propagandilo ne nur en la aktuala jaro.

En la kuranta jaro jam la sepan fojon estis eldonita, same en hungara lingvo, la broŝuro *„Megismerkedem az Eszperantóval"* (Mi konatiĝas kun Esperanto). La aŭtoro de tiu ĉi kajero, estinta redaktoro de la iama H.E., d-ro István NAGY donas en ĝi multajn utiligeblajn indikojn pri Esperanto.

Ankaŭ la E-lingva eldonagado ne ripozis. En tiu ĉi jaro *Hungara Vivo* plenumis sian promeson. Laŭ la deziro de niaj legantoj, ĝi aperas jam sesfoje en la jaro. Dependas nur de ĝia disvastiĝo, ke Hungara Vivo stabiligu tiun pozicion, sed necesas, kara Leganto, ankaŭ via afabla kunhelpo ĉe la abonkampanjo.

Ni ne povas lasi senmencie la freŝan burĝonon de E-lingva presio (gazetaro). *„Juna Amiko"* (Redaktas Géza Kurucz) komencas aŭtune jam sian duan jarkolekton por kontentigi la bezonojn ankaŭ de la pli juna lerneja generacio esperantista. Ni riskas aserti, ke malgraŭ ĝia titolo, la gazeto konvenas ankaŭ por plenaĝuloj, kiuj posedas nur limigitan vorttrezoron kaj ne ambicias altan literaturan nivelon.

HEA uzis ĉi-jare la armilon ankaŭ de la amasmanifestado. Ĝi aranĝis *landan kongreson tritagan en urbo Szolnok.* 800 afiŝoj en la urbo, 300 da ili en multaj fervojaj stacidomoj en la lando avizis anticipe la kongreson ĉe la publiko. Plurdekoj da verdaj flagoj, standardoj akceptis pli ol 400 kongresanojn, kiujn salutis eminentaj reprezentantoj de la partiaj, sindikataj, urbaj instancoj kaj sociaj organizaĵoj. Amike demonstris sian simpation ankaŭ la gazetaro kaj la radio.

La kongreso donis eblon al la hungara MEM-sekcio aranĝi *Pacasembleon.* La tre efikan kaj pripensigan parolon de la oratoro, eksambasadoro, kaj *membro de la Monda Packonsilio József VINCZE* aŭskultis plenŝtopita aŭditorio.

Tiel ni semas kaj semas konstante...

d-ro J. *MÁTÉFFY*

Al ĉiuj esperantistoj

Kiel oni povis sperti, en la lastaj jaroj ni komencis doni ian indan interesan karakteron por ĉiuj numeroj de nia dumanata revuo, Hungara Vivo. La leteroj, opinioj de niaj enlandaj kaj eksterlandaj legantoj atestas, ke ili akceptis ĉi tiun planon favore, ĉar oni ĉerpadis bone el la numeroj de HV — ekzemple — ĉe klubkunvenoj, prezentadoj, lingvopraktikado, informado por vojaĝo ktp. Ni povas rekomendi al ĉiuj esperantistoj:

3/1971 — numero pri K. Kalocsay
4/1972 — n.pri Literatura Mondo
1/1973 — n.pri Sándor Petőfi, poeto
2/1973 — n.pri Gyula Illyés, poeto
3/1973 — n.pri Sándor Szathmári, verkisto
1/1974 — n.pri la originala Esperanto-prozo
2/1974 — n.pri Hungario kiel inda turisma celo
3/1974 — n.pri la originala Esperanto-poezio
4/1974 — n.pri la hungara ekonomia vivo
5/1974 — n.pri la originala Esperanto-dramo
6/1974 — n.pri la hungara scienco

Abonu por vi mem kaj por viaj eksterlandaj amikoj!

Redakcio de Hungara Vivo



D-ro Ferenc László:

La ŝirmado de nia medio estas komuna afero de la homaro

En la lastaj jaroj tutmonde fariĝis komuninteresa la ŝirmado de la homa medio. Tion komprenigas, ke sekve de la eksplodeca evoluo de la tekniko aperis tiaj kontraŭmediaj nocadoj, kiuj endanĝerigas la homan vivon.

Al la fenomenoj, kaŭzantaj la malboniĝon de la homa medio, apartenas

— la malpuriĝo de la akvo, aero, grundo kaj nutraĵoj,
— la intensa plifortiĝo de la bruo,
— la apero de nocaj radiadoj,
— la troamasiĝo de solidaj defalaĵoj,
— la regreso de la estetika kaj plezuriga valoro de certaj naturpejzaĝoj,
— la plimultiĝo de psikaj stresantaj agantoj.

Unu el la fontoj de la kontraŭmediaj nocadoj estas la aliiĝo de la antaŭa ekvilibra situacio, kaŭze de la kvanta kaj kvalita evoluo de la produktiloj; la alia fonto — strikte ligita al la unua—estas la multiĝo de la loĝantaro kaj la urbanizado.

Dum la evoluo de la homaro — se ni ekzamenas longajn etapojn — ĝis nun ĉiam restariĝis la ekvilibro inter la evoluo de la tekniko kaj la homa medio. Sed en nia jarcento la dua scienca-teknika revolucio plirapidigis la evoluon tiagrade, ke la socia ŝirmado, per sia egaliga efiko, jam ne povas esti aŭtomate sinkrona kun tiu procezo. Niatempe jam necesas konscie direktita agado, tiom pli, ĉar la aŭtomata konsciiĝo de la socio pri la danĝeroj okazis ĝenerale nur kun granda malfruo.

En la centro de la medioŝirmado staras unuavice la homo, vivanta en grandaj loksidejoj kaj industriaj centroj; tial — bedaŭrinde — oni devas konsideri vicon de negativaj cirkonstancoj. Oni devas mencii unuavice la iom-post-ioman (kaj en perspektivo de kelkaj generacioj — fundamentan) aliiĝon de la homaj vivkondiĉoj. La homoj tie loĝantaj aliigis sian nutrad-metodon. Ili eltiris sin el sub la efiko de la naturaj ŝanĝiĝoj de la vetero, komencas redukti siajn fizikajn movojn ĝis minimumo kaj krom tio ili estigas ĉirkaŭ si biosferon saturitan per bruoj kaj eĉ pli malpurigitan akvan medion.

Sur la mapo de la mondo plidensiĝas kaj sur ekonomie evoluintaj teritorioj jam formas koherajn regionojn tiaj zonoj, kie en la medioj gravaj por la homa vivo, nome en la akvo, en la aero, sur la agrikulturaj teritorioj, sume en la tuta biosfero, la danĝera nivelo superpasis la permeseblan mezuron, pro tio neniiĝas nereprodukteblaj naturfontoj. La malpurigoj resendas sian nocan efikon sur la fizikan, spiritan kaj socian evoluon, superombras la hejman kaj laborlokan mediojn kaj bremsas la evoluon de la tuta pli larĝa natura ĉirkaŭaĵo.

Eksterordinare maltrankviliga fenomeno estas niatempe ankaŭ la malpuriĝo de la maroj, kiu grandskale endanĝerigas la vivon de la marestaĵoj. Sed sekve de ĝi fariĝas tre malfacila ankaŭ la trinkakvo-produktado bazita sur la sensaligo de la marakvo.

Kio estas la solvo?

Por gardi la deziratan ekvilibron de la homa medio, la sola imagebla vojo estas: tiel evoluigi la artefaritan medion, ke dume oni optimume ŝirmu — ankaŭ en longa perspektivo — la naturan medion. Jam ĉe la komenco de la investado oni devas zorgi pri tio, ke en la genetikan kodon de la realigo, evoluigo kaj modernigo estu enprogramitaj ankaŭ la nemalhaveblaj ekologiaj parametroj.

Nuntempe la rilaton inter la evoluigo de la ekonomio kaj de la homa medio karakterizas unuflanke la dialektiko de la antagonismoj kaj aliflanke la dialektiko de komplikiĝintaj faktoroj reciproke sin kompletigantaj. La interrilato inter la homa vivo kaj la biosfero estas kompleksa, interplektita, multflanka. La taskojn ĉi-koncernajn ni povas esplori

Danubkurbiĝo ĉe Visegrád

nur per multaj scienco-fakoj. Apliko de sole kelkaj scienco-branĉoj per si mem ne povas alporti daŭran rezulton. Grave estas, ke ĉe komunaj fortostreĉoj a aliro al la problemoj — kiej tion ni jam aludis — estu ĉiam homocentra. Plej urĝe estas, ke la socia ekologio kaj la scienco pri la medio-ekonomio trovu kiel eble plej baldaŭ vojon komunan. Civilizacio, eĉ kun tekniko ankaraŭ pli evoluinta ol la hodiaŭa, estas necesa, sed ĝi devas esti ekologia, kaj adaptiĝi senskue al la biologia sistemo de nia Tero. La naciajn antaŭpaŝojn devos sekvi mondskale unuecigitaj instrukcioj por rebonigo de la difektitaj medioj kaj konservado de ilia rebonigita konsisteco. Kaj sur la vojo, kondukanta ekde la nacia ĝis la tutmonda ordofaro, la regiona kunlaboro de la najbaraj landoj estos neellasebla ĉenero.

Sekvante tiujn ĉi principojn, ni povos fari multon por restarigi la difektitan ekvilibron de la natura homa medio kaj preventi la pluajn damaĝojn.

La akvo kiel primara natura faktoro

En la ŝirmado de la natura medio gravan lokon havas la akvo pro sia multrilata signifo. Nome, eble neniu natura faktoro tuŝas tiel vastajn teritoriojn de nia ĉiutaga vivo kaj mastrumado kiel la akvo. La reto de la loksidejoj tiel same, kiel la elformiĝo de la ekonomihistorio de la landoj evoluis ĉiam depende de la ĉeesto de akvo. Sur la nuntempa nivelo de la socia kaj ekonomia evoluo la lukto por la akvo kaj kontraŭ la detruaj fortoj de la akvo ĉiam pli akriĝas. Senutila estas la kolose granda — 1,3 miliardoj da km^3 — akvomaso de la Tero, se nur ties 0,5% estas rekte utiligebla sensala akvo kaj eĉ konsiderinde granda parto de tiu lasta estas malpurigita. La malpurigo fundamente ŝanĝas la enakvan vivomondon, konsekvence ŝanĝas ankaŭ la homan medion kaj en pli strikta kaj en pli larĝa senco. Krom la malpuriĝo de la akvoj — kontraste al la aero, senproblema rilate ĝian kvantan utiligon — ilia tempe kaj loke malegala distribuo kaŭzas jam niatempe gravajn akvomankojn en certaj teritorioj.

Kiajn damaĝojn povas estigi la malpuriĝo de la akvoj, la malstabiliĝo de la ekvilibro de la enakva vivo? Por respondi la demandon oni devas rigardi kelkajn kampojn de la akvoutiligo.

La akvo, kiel esence grava elemento, estas nemalhavebla kriterio de ĉiaspeca vivo. Ankaŭ la homo pli facile toleras la mankon de la nutraĵo ol tiun de la akvo. Ĉe certagrada soifo — tiu grado estas malsama ĉe la diversaj estaĵoj — ĉiu alia postulaĵo fariĝas duagrada.

Ankaŭ la kontentigo de la „soifo" de la industrio ne estas facila tasko, ĉar la postuloj salte kreskas, sed la akvoprovizoj estas limitaj.

Ankaŭ la agrikulturo, produktanta vivantan va-



Detalo el morta brako de la rivero Szamos

La lago Balatono kaj la monto Badacsony

ron — animalojn, plantojn — ne povas ekzisti sen akvo.

La akvo ankaŭ kiel refreŝiga faktoro ludas elstaran rolon en la vivo de la homo. Oni ne deziras daŭre restadi sur senvegetaĵaj teritorioj, dezertoj aŭ karstaj altebenoj, tiom pli sopiras iri apud lagojn, kuŝantajn en pitoreska ĉirkaŭaĵo, apud abundakvajn riverojn garnitajn de arbarostrioj. Al la ripoziga medio oni turnas sin kun estetikaj pretendoj. Ĉio, kio ofendas nian estetikan senton — kiel ekz. la poluita, malpura akvo — misagordas nin. La sopiro al refreŝiĝo kaj ripozo vaniĝas en tia medio, oni ne kapablas senzorgiĝi, senstreĉiĝi.

La akvonodo de Kisköre sur la rivero Tisza



Kion faras kaj kion povas fari la ŝtato kaj la socio por la ŝirmado de la akvoj?

Krom defendi kontraŭ la detrua efiko de la akvo, la digo-sistemoj laŭlonge de la riveroj ankaŭ servas elformiĝon de homa medio. En nia lando, sur areoj drenitaj kaj sekurigitaj per kontraŭinundaj instalaĵoj, elformiĝis vivosfero pli homa, ekonomie pli utila. La 30%-oj de la landa loĝantaro vivas tie en novaj modernaj loĝlokoj, kaj akumuliĝis tie popolekonomia havaĵo en valoro de ĉ. 300 miliardoj da forintoj. Kompreneble, ankaŭ nia respondeco kreskis, defendi tiujn teritoriojn kaj pluevoluigi ilin estontatempe.

Malgraŭ la jam efektivigitaj akvoordigaj laboroj, ekstrem-okaze ankoraŭ internaj akvoj kovras por certaj tempodaŭroj ĉ. 20—25 procentojn de la profunde situantaj ebenaj regionoj. Tie estas necese plu densigi la reton de kanaloj kaj pliigi la plenumo-povon de la pumpila sistemo. Ŝirmi la grundon

kontraŭ detruiĝo en montaj kaj montetaj regionoj, fari akvo-ordigon sur valofundoj, mekanike protekti la grundon sur val-deklivoj, kolekti akvo-rezervojn: ĉio ĉi estas unuaranga tasko de la medio-ŝirmado tiel same en la akvo-mastrumado, kiel en la agro- kaj forsto-kulturo.

La ĉeesto de akvo estas de determina signifo ankaŭ por la homa medio. La grandaj kanaloj jam elkonstruitaj, kiel ekz-e la Orienta Ĉefkanalo, la reguligitaj river-sekcioj, niaj naturaj lagoj, Balatono kaj lago de Velence, kun siaj reguligitaj, prikonstruitaj bordostrioj, estas novaj areoj refreŝigaj por la homo tiel same, kiel niaj artefaritaj akvorezervaj baraĵoj en la departemento Borsod, aŭ en la valo de la rivereto Gaja, sed neniom malpli ankaŭ la nun formiĝanta nova, grandega artefarita lago post la antaŭ nelonge elkonstduita akvonodo de Kisköre. La grandaj akvoaferaj instalaĵoj ne nur kreas novan socian kaj ekonomian fonon, sed samtempe donas novan trajton al la koncerna pejzaĝo. La ordigitaj kaj reguligitaj akvobordaj teritorioj tiel same apartenas al la „homocentra" medio, kiel niaj artefaritaj kurac- kaj strandbanejoj.

Inter la faktoroj, transformantaj la homan medion, eble unu el la plej gravaj estas la provizado per higiena trinkakvo. Dum la pasintaj 15 jaroj la nombro de la loĝantoj provizitaj per kondukila trinkakvo kreskis en nia lando de 2 milionoj al 5,5 milionoj. Per tio ni kreis la kondiĉojn por la modernaj dommastrumoj, por la sana hejmo, por la akvomastrumado de la vilaĝa kaj urba vivo. Sed la rapida urbanizado, la amasa konstruado de loĝejoj el domfabrikaj elementoj, la konstanta akumuliĝo de la loĝantaro en la novaj kaj malnovaj loĝlokoj postulas ĉiam pli novajn fortostreĉojn.

Nuntempe la malpurigitaj akvoj efikas kun kreskanta danĝereco sur la naturajn akvojn, damaĝas la vivomondon de la akvoj, limigas la refojan uzadon de la jam uzita akvo. Ĝuste pro tio unu el la plej gravaj taskoj de nia tutlanda akvomastrumado fariĝis la defendado kontraŭ la akvopoluado. La instrukcioj faritaj ĉi-kampe favore influis la situacion pasintjare.

Koncerne la ŝirmadon de la akvokvalito grandan signifon havas la rezultoj atingitaj jam ĝis nun en la kunlaboro realigita kun la najbaraj landoj. La fundamentadon de la modernaj akvodefendaj sistemoj servas la nun konstruataj teritorioj de la modela ŝirmado de akvokvalito apud Danubo kaj en la valo de la rivero Sajó, ambaŭ kun la financa subteno de la Evoluiga Fonduso de UN. Ili estos la modeloj de la kompleksa reguligo de akvokvalito en nia lando.

La organizita ŝirmado de akvokvalito havas do komencajn rezultojn: la antaŭa rapida malpuriĝo de la akvoj moderiĝis. Sed la taskoj de la estonta tempo postulas pli da fortostreĉo, ja la kvanto de la industrie kaj dome poluata akvo kreskos dum la venontaj 15 jaroj tage de 3 al 7 milionoj da kubmetroj. Paralele kun la kresko de la poluo-danĝero kreskos ankaŭ niaj devoj por la akvo-ŝirmado.

*Gloso: polui malpurigi medion de vivo



La saniga termalakva banejo de Hévíz

Oni devas ĉiam konscii, ke la poluado de niaj akvoj jam ne estas pliigebla, eĉ se tio postulas tiajn investadojn, kiuj nur malrapide repagiĝos kaj pro tio la rentabilitato provizore malpliiĝos. La ŝirmado de la homa medio, la certigo de la kondiĉoj de la sana vivo ne povas esti nur objekto de momenta financa prikonsidero. Eĉ tiam ne, se la elspezo repagiĝos nur post longa tempo — eventuale en jarcentoj —, ja temas pri la estonteco de nia ekzistado.

Tr. Tibor ÚJLAKY-NAGY

La akva muelejo en Turistvándi

Lajos Tárkony

REVUO DE REVUOJ

NORDA PRISMO! La reviviĝo de ĉi tiu revuo estu la *evento* en mia nuna revuado. Multan sukceson kaj koran dankon al *Vilho Setälä,* kiu donis al la revuo certan azilon ĉe la *Fondumo Esperanto* en Iirislahti. La revuo ŝanĝis sian eksteron tradician, prezentas sin en flava vesto anstataŭ la verda, ĝia papero iĝis pli dika kaj pli fajna. Bedaŭrinde, ĝia amplekso malkreskis, sed estas ja la tasko de la abonantaro ĝin rekreskigi. Mi nur konsilus — se licas tion fari — ke la redakcio estu treege elektema koncerne publikigaĵojn, por kompensi la ampleksoperdon per denso de bonaj tekstoj. La karmemora Szilágyi majstre sciis, kiel elekti tekstojn valorajn sen malfacileco kaj facilajn sen trivialeco, krome ĉiam interesajn. — Ĉi-numere mi dubas pri la publikindeco de „Plano" verkita de *Lúdviksson.* En ĝi tra preskaŭ kvar paĝoj lamentas membro de Societo de Ford-posedantoj, ke lia frato estas obstina Ŝevrolet-posedanto, do ne povas esti membro de tiu societo; li teksas planojn, kiel fari lin Ford-posedema por membrigi lin tie. Komence tio ŝajnis al mi reklamo de la Ford-aŭtoj; bonege, mi pensis, la revuo certe enspezis belan sumon. Poste mi komencis opinii, ke la verkaĵon — eble — oni povas preni kiel ironian; sed tiam ĝi estas multe tro longa por esti ĝuebla. — Ankaŭ „Okuloj" de *Sekerĝiev,* kvankam ĝi havas belajn partojn, estas tro longa por sia temo: tia speco de „poemo en prozo" ne devus havi pli da amplekso ol la triono aŭ duono de la farita. — La artikolo pri *Hamsun,* verkita de lia filo, povas esti interesa, sed kvaronjara revuo laŭeble ne distranĉu artikolojn en daŭrigojn; tio ja tro streĉas la paciencon de la legantoj. — Salutinda estas la bela memoraĵo de *Reinhard Haupenthal* pri *Raymond Schwartz,* kun tutpaĝa foto kaj kompleta bibliografio. Tamen, ne tute juste estas riproĉi al Kalocsay, ke en sia rondelo verkita en 1931 li ne povis karakterizi la „malfruan" Schwartz. — W. *A. Verloren van Themaat* kontestas, ke la plej malfacile tradukeblaj literaturaĵoj estas la unuarangaj majstroverkoj de la mondliteraturo; laŭ li, plej malfacile estas traduki versteknikajn lertaĵojn, poemojn, kies valoro sidas ne en la sensignifa enhavo, sed en **la rafinita** versmuziko. Nu, tiuj estas ne malfacile tradukeblaj, sed simple netradukeblaj poemoj, do troviĝas ekster konsidero. Li citas nederlandan poemon en du versoj, en kiuj ĉiu silabo de la unua verso rimas kun la responda silabo de la dua; tiaspecan poezion oni trovas ĉe ni en enigmogazetoj. Malfacila tasko estas traduki Dante, Shakespeare, Baudelaire, Mickiewicz kaj similajn en la originala formo kaj kun la originala efekto. Kaj la moto de la artikolo, la groteska (e)pistolo de E. de Kock („Ajnon krom vi traduki abomenu") forpafus el nia literaturo krom ĉefverkoj de la supre nomitaj aŭtoroj ankaŭ la Antologiojn (anglan, bulgaran, ĉeĥoslovakan, hungaran, katalunan, svedan, svisan ktp.), do rifuzus al E-o la rolon interpreti la mondliteraturon. Feliĉe, ĉi tiu numero mem kontraŭas tiun postulon, publikigante tutan anglan antologieton (10 poemojn) laŭdinde tradukitan de *W. Auld,* inter ili la faman „Ĉielo" de *Rupert Brooke.* Ni deziras al la revuo nepereigeblan forton, senembarasan vivon kaj baldaŭan plidikiĝon.

El la HEROLDO DE ESPERANTO oni ĉiam povas pluki interesaĵojn. Jen (Nro 8): grava plendo por la latina. *J. Chastenet,* membro de la Franca Akademio, volas, ke la latina fariĝu la lingvo de la Komuna Merkato, ĉar la franca perdis tiun rolon kaj la angla tro fortigus la Usonan influon. Sed ĉu li ne pensis pri tio, ke en la latina mankas vortoj por la nocioj de la nuna vivo, krome, ke la latina estas malmulte kapabla por vortkunmeto kaj tial la diversaj nomenklaturoj enhavas grekdevenajn terminojn, ekzemple ne *terrascriptio,* sed *geographia,* ne *ventromembraninflammatio,* sed *peritonitis.* Estus ja bele, se en UN oni oratorus kun la elokvento de Kikero aŭ Cicero, kaj la reporteroj uzus la stilon de Tacitus aŭ Takitus, sed por tio oni devus ilin resendi en lingvolaboratoriojn por 8 jaroj almenaŭ. Ĉiuokaze, la propono bone montras, ke la nuna situacio, kun interpretistoj kaj teknikaj establaĵoj, ne estas kontentiga. — El la sekva numero mi citu, ke la araba lingvo estas en leviĝo, ke la portugala pretendas oficialecon en UN, ke la angla lingvo pereadas el Hindunio, Pakistano, Bangladeŝo, ke aperos Antologio pri la moderna, ĉijarcenta Usona literaturo en la redakto de Prof-ino *Margaret Hageler.* — *G. C. Fighiera* inter siaj „senpretendaj konsideroj" proponas kelkajn aprobindajn kaj apogendajn aferojn al UEA: kampanjon por-E-an okaze de monda ĵamboreo en 1975, sportan kampanjon okaze de la venontaj Olimpikoj, Somerajn Universitatajn kursojn en 1974.

LA BRITA ESPERANTISTO (Nro 3—4) enhavas du artikolojn, de *D. Hill* kaj *E. L. M. Wensing,* kiuj postulus longan alparolon. Tamen, pro manko de loko, ilian grandan temon mi devas konservi por la proksima fojo. Nun mi rimarkas nur, ke la sloganoj „Esperanto, la lingvo de la internacia paco" kaj „Esperanto por internacia fratiĝo" povas ŝajni, laŭ unu el la artikoloj, „politike maldekstrumaj". Tio min mirigas, precipe nun, en la tempo de la internacia mal streĉiĝo.

INTERNACIISTO, „Organo de la progresema laborista esperantistaro", aperanta en Wien (Aŭstrio), petas pri recenzoj. Sincere ni salutas la gazeton, kiu plenigas tre sentebblan mankon. Ĝiaj informoj estas bone kolektitaj, sed ĝi bezonas urĝan pliamplekŝiĝon por argumenti malpli afiŝ-maniere. Tio kompreneble estas demando de „municio". Kun granda simpatio mi sekvos la vojon de la gazeto, espereble prosperan.

OOMOTO (Nro 1—2) havas interesan artikolon pri la japana ekonomio. La aŭtoro, *William Harmon* el Usono, akre kritikas la japanajn cirkonstancojn, inflacion por vivkostoj, malbonan staton de la laboristaro. Krom mia aprobo mi devas diri, ke li skribas tiel supereme, kvazaŭ en Usono ĉio estus en ordo, kvankam kiel grandan atuton li povas elmontri nur Ralp Nader, la ĵurnaliston, kiu per kolera kritiko de l'industrioj protektas la konsumantojn. Kia malegala batalo! — Mi ne preteru, ke la gazeto publikigas novelon de la hungara *I. Sarkadi,* en la traduko de *J. Kiss.*

JUNA AMIKO, lerneja revuo, brave eltenas kaj sukcese klopodas plenigi siajn paĝojn per laŭeble internacia materialo laŭ la gusto de la lernantoj.

La inauguro de tombostono de Julio Baghy

Rememoru pri la homa homo

Kiam en 1961 aperis la 1-a numero de Hungara Vivo, la enkondukajn vortojn skribis Julio Baghy jene: „El mia lando en la nomo de la tuta hungara esperantistaro mi sendas mian tutkoran saluton al niaj karaj esperantistaj gefratoj, okaze de tio, ke ni povas plivastigi nian movadon, pli larĝe propagandi nian karan lingvon per novaj batalilo j per la revuo: Hungara Vivo. Mia unua voĉo estas la voĉo de la ĝojo, la voĉo de la firma konvinkiĝo, ke »Ni atingos la celon en gloro!« Sed por tio estas bezonata la internacia kunlaboro por krei kaj konservi daŭran pacon..."

Li mem atingis la daŭran pacon, mortinte en 1967, la 18-an de marto en Budapeŝta hospitalo, post longa malsano, en la aĝo de 76 jaroj. La 25-an de marto, en antaŭ-Paska sabato, posttagmeze je la unua horo, en Budapeŝto, en la tombejo de Farkasrét, okazis la malgaja entombigo. Sur la ĉielo malserenajn, malhelajn nubojn pelis la vento kaj milde ploris la nimbusoj. Ĉio estis nigre funebra. Kun flavaj koloroj brulis la kandeloj. En la ĉerko kuŝis trankvile la homo, kiu certe sonĝas plu pri sia eterna revo, pri la evoluo de Esperanto. Post la funebraj paroloj, pli ol mil homoj akompanis la nigran ĉaron ĝis la tombo. Oni metis la ĉerkon en la tombon, kaj la ĉirkaŭaĵo de la tombo senpopoliĝis. Jen la ĉiama sorto de ĉiu homo.

Dum sep jaroj dorminte en la tombejo de Farkasrét, nun li ricevis honorlokon en la tombejo de Kerepes, kiu estas la plej distinga tombĝardeno de la ĉefurbo. Multaj eminentuloj de nia nacia historio kaj spirita vivo dormas tie sian eternan dormon. Ekde la jaro 1958 tie estas la Nacia Panteono. En la parcelo de famaj verkistoj staras la nova tomboŝtono de Julio Baghy. Ĉirkaŭ li ripozas inter aliaj Ady, Arany, Babits, Jókai, Kisfaludy, Kosztolányi, Mikszáth.

En 1974, la 14-an de julio, okazis la solena inaŭguro. La lazuro estis tute sennuba, la suno kiel arda kristalglobo brilis sur la ĉielo. Sub la verdaj, ombroplenaj arboj en longa vico venis la veteranaj esperantistoj, amikoj, konatoj kaj la honorsalutaj homoj. La familio de la granda mortinto staris jam antaŭ la ŝtonkolono, skulptita el marmoro de minejo Süttő. En la ringo de partoprenantoj, antaŭ la tombo, kies kolono estis kovrita per Esperanto-flago, la prezidanto de HEA, d-ro József Mátéffy diris la festan paroladon.

—...kiam Julio Baghy, post la unua mondmilito en 1920 revenis el la militkaptiteco, li tuj aliĝis al la movado... kaj kiam, kiel kometo aperis en 1921 la „Mondo kaj koro" de Kálmán Kalocsay kaj en 1922 „Preter la vivo" de Julio Baghy, eksplodis la krio: Ĉu oni povas krei eĉ tiajn perlojn en la literaturo de E-o. Vere, en 1922 ekiris la revuo „Literatura Mondo" en la redaktado de la du grandaj poetoj. ...Julio Baghy ne sekvis la tradiciajn formojn, sed formis propran stilon, laŭ la inspiro, tial oni diris, la poezio de Baghy samtempe estas belega muziko de la vortoj... Inter la du mondmilitoj 17 landojn de Eŭropo vizitis Baghy, instruante Esperanton kaj per sia persona ĉarmo akiris multajn amikojn al Esperanto kaj Hungario...

(Foto de Zoltán Fejér)

Post la morto de Baghy la Ĉefurba Konsilio metigis memortabulon sur tiun domon, en la strato Rottenbiller, kie li loĝis. Li estas la unua kaj ĝis nun la unusola esperantisto en Hungario, kies korpon la Konsilio translokigis al honortombejo kaj la starigon de la ŝtonmonumento helpis finance... Julio Baghy, kiu en sia vivo estis eterna migranto de la vojoj, post la morto alvenis al digna kaj eterna ripozloko. Heroldu tiu memorkolono la veran honoron de hungaraj esperantistoj kaj estu tiu tombo lia pilgrima loko de ĉiu esperantisto de la mondo! — finis sian paroladon la prezidanto de HEA.

SZILÁRD BÁLINT

Altlerneja biblioteko en Keszthely
Eifert

La unua agrokultura faklernejo de la mondo estiĝis en Hungario. En 1780, en la urbo Szarvas, Sámuel Tessedik fondis la lernejon. La unua agrokultura ĉeflernejo de la mondo estis fondita en 1797 en la urbo Keszthely, kun la nomo Georgikon.

La fondaĵon de memstara Agrarscienca Universitato dekretis la ŝtata registaro en 1945 la 26-an de Septembro. La loko estis elektita en la urbo Gödöllő. Unue oni uzis la konstruaĵon de gimnazio, konstruita en 1928. Samtempe komenciĝis grandega konstruado de universitata urbo, kiu situas sur 247 hektaroj. La studenthejmo havas 1200 litojn, la medicina prizorgo havas 60 litojn por la malsanuloj, la kuirejo kaj la manĝejo servas por 2500 personoj. Ekzistas ankaŭ centra katedro kun aŭlo, studlaborejo, kvin grandaj prelegejoj kaj pli malgrandaj seminariaj ĉambroj por 1100 personoj.

En la taga sekcio lernas 1700 gestudentoj, en la koresponda kurso partoprenas 900 personoj. Fine 360 instruantoj kaj esploristoj — inter ili multaj Eŭrope-famaj profesoroj — laboras en la Universitato, kies tasko estas eduki agrarinĝenierojn, uzinekonomojn, agrokulturajn mekanikinĝenierojn, inĝenier-profesorojn por la tuta popolekonomio.

*

Reliefa fundoplato de mil-hektolitra lignobarelo pretiĝas en la vilaĝo Benzurfalva, en la artlaborejo de la Kossuth-premiita skulptisto István Szabó. Sur la kverkoplato, peza 1500 kilogramojn kaj kies diametro estas 438 centimetroj, la 71-jara majstro skulptas reliefojn, pri la deklivoj de provinco Eger, pri la gaja vinrikolto, pri la mosto fermentanta en la kuvoj, fine pri la maturiĝo kaj prizorgado de noblaj vinoj sur surfaco de 18 kvadratmetroj. La artaĵo estos preta ĉe la fino de la nuna jaro: tiam oni transportos ĝin al Budafok, kaj tie en la ŝtata vinkelo estos farata la grandega vinbarelo, pezanta sen vino 25 800 kilogramojn. Post la ĉi-jara vinrikolto oni plenigos la barelegon per dolĉa mosto.

*

panoramo

La Federacio de Unuiĝintaj Nacioj donas subtenon por la utiligo de la hungaraj termo-akvoj. Nia lando havas multajn kuracfontojn, kiuj estas eksterordinare konvenaj por estigo de ripozlokoj kaj fremdultrafikaj terenoj. Laŭ la interkonsento jam formiĝis la regiona evoluiga kaj projektanta oficejo, kiu ĝis la jaro 1976 faros proponon pri la lokoj, pri la maniero de efektivigo kaj prilaboros la teknikajn kaj ekonomiajn kondiĉojn. Trionon de la elspezoj pagas la Evoluiga Fonduso de la Unuiĝintaj Nacioj, du trionojn Hungario. La financa helpo ebligas, ke eminentaj eksterlandaj kompetentuloj povu partopreni en la ellaborado de la planoj kaj ankaŭ hungaraj fakuloj kolektu spertojn eksterlande.

La termo-akvo estas granda trezoro kaj donas eblon por tio, ke en Hungario pligrandiĝu la fremdultrafiko, kaj multaj eksterlandanoj trovu resaniĝon per la kurac-akvoj en modernaj ripozejoj.

*

La Landa Naturprotekta, Konsilantaro aprobis la estigon de Nacia Parko en la provinco Kiskunság. Laŭ la plano sur areo de 20 mil hektaroj oni kreos la duan nacian parkon de la lando, kies unika flaŭro kaj faŭno estas de unika natura valoro. Ĝi estos parto de tiu granda plano, laŭ kiu, ĝis la jaro 1990, kvin naciaj parkoj estiĝos en Hungario.

Nun en nia lando ekzistas 100 mil hektaroj da naturprotekta areo, kaj ĝis la fino de la plano ĝi pligrandiĝos je 450 mil hektaroj, kun naturaj belaĵoj kaj valoroj indaj esti konservataj por la sekvonta generacio.

*

En multaj landoj de la mondo UNESCO faras kontakton kun diversaj instruadaj institucioj; ĉi tiujn oni nomas asociaj lernejoj de UNESCO. En Hungario ekzistas 26 tiatipaj mezlernejoj: al ili apartenas la fama gimnazio en la urbo Sárospatak. UNESCO sendas diversajn kulturajn kaj sciencajn eldonaĵojn al la mezlernejo, kies biblioteko jam estas tre riĉa. La eldonaĵoj aperas en angla, rusa, franca kaj germana lingvoj. La profesoroj povas ilin utiligi por la intensa laboro de lingvoinstruado.

Por la fruktuzo de la oportunaj ebloj ĉijare UNESCO-rondo estiĝis en Sárospatak, en la gimnazio. Ĝia gvidanto estas profesoro Ferenc Juhász, kiu helpe de UNESCO jam ofte vizitis eksterlande diversajn asociajn lernejojn kaj povis studi la tieajn lingvoinstruadojn.

Striktaj interrilatoj plektiĝis kun la hungaraj gelernantoj vivantaj kaj lernantaj en la najbara lando Slovakio. Precipe bona estas la interrilato kun la lernantoj de hungaraj mezlernejoj en la urboj Kassa kaj Királyhelmec, ĉar la gejunuloj ofte vizitas sin reciproke.

La lingvolernado estas grava rimedo de internacia kompreno, tial la asociaj lernejoj proponis, ke la hungara UNESCO-instituto organizu fremdlingvan tendaron, kie povus renkontiĝi la diverslandaj UNESCO-rondoj unuj kun la aliaj.

panoramo

En Budapest ĉe la placo Martinelli oni malfermas en la administrado de la Hotela kaj Kuracbana Entrepreno Danubius la unuan oficejon, kiu certigas loĝejon por la gastoj intencantaj vojaĝi al tiuj banlokoj, kies akvo kuracas la reŭmatismon. La oficejo donas specialan informadon pri la efiko de diversaj kuracbanoj. Nun oni ĉefe rekomendas la kurac-fontojn de Harkány, Hajdúszoboszló, Bükfürdő, Gyula kaj Zalakaros.

La nova oficejo estas parto en la programo de la Entrepreno Danubius: starigi la patrolandajn kuracakvojn en la servon de la fremdultrafiko. Laŭ tiu programo jam konstruiĝas en Hévíz la Hotelo Termal, kiu havos sep etaĝojn. Oni jam komencis konstrui en Budapest sur la Margareta-insulo la novan grandan kurachotelon. En la kvartalo Buda apud la Fiŝkaptista Bastiono jam konstruiĝas la nova hotelo Hilton. Laŭ la planoj en 1977 jam 2000 litoj estos je la dispono de alvenintoj serĉantaj resaniĝon.

*

Ŝtona kapo el la preĝejo de Ják (XII. jarcento) — foto de Károly Gink





Detalo el la fortikaĵo de Sárospatak — foto de János Eifert

En la komenco de Julio okazis interesa renkontiĝo inter la oldaj studentoj, kiuj dum la lastaj kvindek jaroj lernis en Sárospatak. En la pasintaj jaroj ĉiu lernejo aparte aranĝis la propran renkonton, en 5—10 jaraj intertempoj. Nun la lernantoj de diversaj aĝklasoj kaj diversaj lernejoj kune aranĝis la renkonton por tiuj, kiuj dum la pasintaj 50 jaroj studis ĉie ajn en Sárospatak. La oldaj studentoj venis el ĉiu parto de la lando, ankaŭ el la diversaj partoj de la mondo kaj disvolviĝis tre interesa ideo-ŝanĝado inter la junaj kaj maljunaj homoj.

La grandioza renkonto komenciĝis kun interkona vespero en la ruĝa turo de la Rákóczi-fortikaĵo. Sekvatage okazis la solena malfermo, kie la psikologo dr. István Harsányi diris festan paroladon, poste József Tóth, la prezidanto de la Urba Konsilio raportis pri la evoluigo de la urbo Sárospatak. Dr. András Madas, vicministro faris prelegon pri la arbaroj de la montaro Zemplén. En la sama tago posttagmeze okazis ekskurso al la arbaraj lokoj Megyer, Királyhegy kaj Botkő. Vespere estis intim-etosa bivakfajro kun muziko,, kie per fluto ludis muzikartisto János Béres. En la posta tago okazis aparte la klasaj renkontoj por la oldaj studentoj. Vespere, en la burĝa preĝejo estis koncerto kun la partopreno de orgenartistino Lilla Szathmáry kaj kantado de Ferenc Béres.

La preskaŭ unusemajna granda kunveno ĉiuhore havis riĉan kaj interesan programon. La celo de la aranĝaĵo estis, ke la iamaj lernantoj, kiuj en tiu urbo akiris la kvalifitecon, ekkonu la sorton de Sárospatak kaj movu antaŭen la sciencan formadon de la nuna generacio.

*

En la urbo Szeged kunsidis kun la prezido de ministro d-ro Imre Dimény la Landa Memorkomitato pri Pusztaszer. Temis pri tio, ke en tiu loko oni estigu Nacian Memorparkon. Tiucele la komitato anoncis landan plankonkurson. Antaŭ 1077 jaroj okazis la hungara patrujokupo, kaj tiam sub la gvido de militestro Árpád la sep hungaraj gentoj faris en Pusztaszer la t. n. sangfederiĝon en hungaran nacion. Apud tiu loko staras la monumento de Árpád kaj la malkovritaj ruinoj de monaĥejo, kiuj ankaŭ mem estas fremdultrafikaj vidindaĵoj. Laŭ la plano oni konstruos tie du memormuzeojn kaj lokos la mondfaman rondforman bildon de pentristo Feszty, kies titolo estas: „La enveno de la hungaroj."

Kompilis kaj tradukis: Szilárd BÁLINT

Miklós-Tóth Máthé:

LINGVOKURSO

Emil Skurĝai ellernis Esperanton el kolerego. La afero komenciĝis kun tute ĉiutaga hungareco en la Papriko-ĉardo, kie Skurĝai manĝis porklumbaĵon laŭ hungara maniero kaj per karakterize hungara rigardo skurĝis la tre ĉarman hungarinon sidantan ĉe la kontraŭa tablo.

Post la konatiĝo, kiam ili jam trinkis kune la konjakon kaj manĝis la marono-kaĉon kun kremo en iu kafejo, la virino neatendite lin demandis:

— Ĉu vi estus preta je mia peto lerni germane?

— Eĉ sanskrite — respondis Skurĝai galante, sed poste klariĝis, ke sufiĉas la germana lingvo sola, ĉar la virino vizitas germanan lingvokurson, kaj estus pli interese kune krakigi la germanajn vortojn.

— Sciu — klarigis la virino —, kiel eksce estus legi en originalo la versojn de Schiller, Goethe aŭ Brecht! Certe tiaj pensoj vekiĝis jam ankaŭ en via kapo, ĉu ne?*

Nu, en la kapo de Skurĝai fakte vekiĝis jam penso, ke estus bone ellerni iun fremdan lingvon, sed tiu penso, kiel tiom multaj aliaj decidoj, tuj post la vekiĝo turnis sin sur sian alian flankon en lia kapo kaj pace dormetis plu.

Nun tamen li ekcerbumis, vidante la ideale sveltajn krurojn de la mini-jupa virino: nu jen por mi okazo ligi agrablon kun utilo. Mi ellernos la germanan lingvon kaj dume konkeros ĉi tiun brilegan virinon!

Ŝi kvazaŭ divenis, kion li planas, ĉar ŝi proteste levis sian fingron kaj kveris kun velure varma voĉo, kiu tiel same plaĉis al Skurĝai, kiel ŝiaj kruroj.

— Sed konfesi al mi amon licas nur germane! Se vi deklamos Heine-poemon en bosko, kaj se vi citos Freud-on en originalo... tiam eble mi trovos vin aminda. Ja, se konsideri funde, vi ŝajnas viro simpatia. Nu, ĉu vi akceptos la kondiĉojn?

Skurĝai volis protesti, ke prefere li deklarus amon hungare kaj tuj, sed li ne emis retiriĝi de antaŭ la malfacilaĵoj, tiel do, ensorbinte pluan kvanton da konjako, li konsentis pri la kondiĉoj.

Ili vizitadis la germanan lingvokurson dum tri semajnoj, kaj saluti ili jam sciis preskaŭ perfekte, eĉ jam troviĝis tia germana vorto, kiun ili konis, kiam okazis io neatendita. La virino sciigis al Skurĝai, ke devas temi pri ia miskompreno, ĉar propre ŝi dezirus ellerni la anglan lingvon.

— Ĉu vi povas imagi — ŝi entuziasmis —, kiel eksce estus legi en originalo Shakespeare-on? Mi vere ne scias, kial ni malŝparis tempon por tiu seka kaj kraka germana lingvo. Krome, Goethe enuigis min jam kiel lerneja deviga legaĵo, ankaŭ Schiller ne povis min kateni, sed Byron — li estas terure unuaklasa! Se vi citus al mi ian poemon de Byron...

— Jes, mi scias, en bosko, — kapjesis Skurĝai kapitulace.

— Ba! — mansignis la virino pliĝustige —, tute ne en bosko! Al Byron konvenas citadelo kun malnovaj embrazuroj, kun katakomboj morne oscedantaj, kie resonas nia krio kaj kie en angoro palpante ni serĉas la manon unu de la alia. Tie, jes, tie mi forgesus pri la grize kunfluantaj labortagoj kaj timtreme aŭskultus vin deklami el Byron. Tiam... tiam eble mi trovus vin aminda. Ja, se konsideri funde, vi ŝajnas viro vere simpatia.

La virino ĉiam ankoraŭ estis bela, kaj Skurĝai komencis kun ŝi anglan lingvokurson. Ili vizitadis la kurshorojn dum du semajnoj, kaj ili jam komencis rekoni la literojn, eĉ prononci „hallo" en la telefonon ili sciis tiel perfekte, ke neniu denaska anglo pli bone, sed tiam venis novaj malfacilaĵoj.

— Terure — plendis la virino —, ĉi tiu angla lingvo estas tia, kvazaŭ oni havus ĉiam gripon kaj elfaligus la vortojn tra la nazo. La denaskaj angloj probable jam alkutimiĝis al tio, sed mi ne kapablus alkutimiĝi. Kion vi opinius prefere pri la hispana? La lingvo de Cervantes, Calderon, Garcia Lorca! Se eĉ ne paroli pri tio, kiom pli melodia ĝi estas ol tiu angla nazotordo! Se iam vi al mi poemon de Lorca...!

— Jes, mi scias, ĉe la fortikaĵa frontono... — ĝemetis Skurĝai kun malsereniĝanta frunto.

— Ej, kion do vi diras? — rigardis la virino indignigite. Lorca-n mi povus imagi nur en roz-laŭbo; ni sidus sur ŝtonbenko, kaj ie malantaŭ ni sur unusola gitaro iu plukus strangan hispanan melodion. Se vi tiam en originalo...

Kiel ajn nekredeble, la virino ĉiam ankoraŭ estis bela, kaj Skurĝai, kvankam kunpremante la dentojn, aliĝis kun ŝi al hispana lingvokurso. Ili vizitis tiun dum unu semajno, kaj kelkajn vizaĝojn de la partoprenantoj ili jam sciis distingi de la aliaj, kiam la virino elkovis novan ideon.

— Vidu, Skurĝai — ŝi komencis mistere —, ni devos ellerni propre Esperanton. Vere estas superflue malŝpari tiom da tempo por encerbigi oldajn lingvojn aĝkadukajn, dum ni povus lerni bubaĝan mondlingvon, en kiun ja estos tradukitaj kaj Goe-

the kaj Byron kaj Lorca, do ni havos nur gajnon el tio. Kaj se vi esperantlingve...

— Ĉu en roz-laŭbo? — demandis Skurĝai kun retenata kolerego.

— Nu, ne — cedemis la virino —, tio en ĝi estus ja interesa, ke ĉie ajn vi povus konfesi amon. Eĉ en kafejo. Ĝi estas mondlingvo, kiun ne ligas tradicioj. Sed atendu... io tamen venis al mie en la kapon. Mi imagas malplenan klasĉambron kun la oleoodoro de lernejo, nigran tabulon, kaj en la angulo terglobon, sed ĝi povas esti ankaŭ mondmapo, poste vi surpaŝus malrapide la katedron kaj citus en Esperanto Vergilion.

— Kial ĝuste Vergilion?

— Mi mem ne scias, sed tio estus vere eksca! Tiu antikva bubo en tute freŝa mondlingvo, ĉu vi sentas ties kontraston?... Tie mi sidus enpremiĝinte en benko kaj aŭskultus vin brilokule, kaj tiam... tiam eble tute certe mi trovus vin aminda. Ja, se konsideri funde, vi estas viro simpatia.

Skurĝai tremis de kolero, dum kelkaj tagoj sendorme li sin ĵetadis, sed ĉar la virino (kiel ajn nekredeble) ankoraŭ post ĉio ĉi restis bela, li aliĝis kun ŝi al Esperanto-kurso. Ili jam aperis tie du fojojn kaj sciis precize, tra kiu pordo oni devas eniri por ĉeesti la instruadon, kiam la virino malgaje ekparolis jene:

- Imagu, kio venis al mi en la kapon? Tio, ke kiom ni estus jam progresintaj, se ni ne forlasus la germanan lingvokurson! Nun vi jam certe povus al mi deklami ion de Heine kaj citi el Freud. Ĉu vi ne pensas, ke tamen estus pli bone tion daŭrigi?

Responde al Skurĝai haltis eĉ la spiro, kaj kvankam la virino estis senŝanĝe bela, tiumomente li vidis ŝin tiel malbela, ke li miris, kiel li povis iam ŝin alparoli.

— Ne! — li ekklakegis, densigante sian tutan koleregon en ĉi unu solan vorton. Por mi jam tro sufiĉas tia pendolado. Komprenu, ke mi volus fine ellerni ion laŭorde! Mi restos ĉi tie.

Jen kiel Emil Skurĝai ellernis Esperanton el kolerego. Kaj pro la malvenko, vundinta lian senteman vantecon, lin iom kompensis la neatendite prezentiĝanta eblo, ke vere nur helpe de tiu melodia lingvo li povis ekkoni multajn librojn kaj informojn, kiujn li ne trovis inter la hungarlingvaj tradukoj. La virinon plu neniam li renkontis. Nur tiom li aŭdis pri ŝi, ke baldaŭ post la „lingvokursoj" ŝi edziniĝis al metiisto fabrikanta modjuvelojn, kiu sciis ja paroli nur hungare, sed kies monujo, kompense, flustris seplingve.

(Laŭ la originalo aperinta en Eszperantó Magazin)

Tr. M. FEJES

* Eksca = ekscita (laŭ ĵargona kurtigo konforme al la originalo).



MODERNECO
MAKSIMUMA KOMFORTO
MODERA PREZO

Meblofabriko KANIZSA

Moderna produktado–moderna produktaĵo!
Loĝoĉambroj Kanizsa–IV, Piccolo, Karina–I, Karina–II, Kékes, Kupido, Kata, Korona, Titusz, –junulara ĉambro Tavasz kaj infanĉambro Kari.
Tapetitaj garnituroj Kedvenc, Rio, Tirol, Piccolo, Titusz, Andrea unupersonaj kaj Kanizsa dupersonaj sofoj, kuŝejoj.
Petu tiujn produktaĵojn–niaj produktoj estas aĉeteblaj en la tuta lando!

Adreso: KANIZSA BÚTORGYÁR (Meblofabriko Kanizsa) 8801 Nagykanizsa, Szemere u. 4. Pf.: 55

SOCIO KAJ MUZIKA KULTURO

En la lasta tempo la socia vivo kaj kune kun ĝi la kultura vivo ekiris en la tuta mondo vojon al unueco. Ni ĉiuj estas atestantoj de ĉi tiu tendenco.

La ĉefaj iloj de ĉi tiu progreso estas la ĉiam pli perfektiĝantaj multaspecaj komunikiloj, la radio, la televido, la rapidaj aeroplanoj ktp.

Ĉi tiun pozitivan tendencon kontraŭdiras, ke la formoj de nia kultura vivo plejparte ekestis en la pasinta jarcento kaj la batalo inter la novaj eblaj kaj la pasintjarcentaj ideoj fariĝas pli kaj pli akra.

Mi intencas per kelkaj frazoj pritrakti la konsekvencojn de ĉi tiu historia situacio, direktante la atenton al la muzika vivo.

La 19-a jarcento kreis la ideon de la unueco de l'arta muzikkulturo en Eŭropo. La bazo de ĉi tiu ideo estis la nacia stilo de la arta muziko. La naskiĝantaj multaspecaj naciaj stiloj kunfandiĝis je unuo de folkloraj muzikaj kulturoj.

La koncepto „folkloro" naskiĝis en la pasinta jarcento, kiam multaj landoj, vivantaj ĝis tiam en koloniaj cirkonstancoj, reviviĝis, organizis movadojn liberigi sin de la multcentjara jugo de pli fortaj kaj pli riĉaj landoj.

En la muzikkulturo ĉi tiu tendenco aperis eble plej okulfrape. Ne povas esti hazardo, ke la naciaj stiloj en la muzikkulturoj ekfloris en la tempo de la naskiĝo de l'naciaj movadoj de iamaj koloniaj landoj. Ĉi tio okazis en la tempo de l'ekesto de la naciaj muzikstiloj de la ĉeĥoj (Smetana, Dvorák), poloj (Moniuszko), rusoj (Musorgskij, Borodin ktp.) hungaroj (Liszt, Erkel).

La folklora elemento en la muziko de la 19-a jarcento baziĝas sur la popolmuziko, pli ĝustadire: sur la muziko de la kamparanoj; ĉar tiutempe la kamparanoj gardis plej pure la tradician muzikon de la nacio. Ni ne devas forgesi, ke ĝis la likvido de la feŭdalismo la kamparanoj estis la plej subpremita parto de la socio. Ni povas ĝenerale konstati, ke *folkloro estas la totala socia konscio de la ekspluatataj klasoj de la socio.* El ĉi tio sekvas ke post la likvido de la klasa socio la folkloro mortados kaj vivos dum kelke da tempo nur en formo de tradicioj.

Ni vidas do, ke la ideo de la unueco de la muzikkulturo estas iluzio de la 19-a jarcento.

Alia iluzio estas la opinio pri la estetika unueco de ĉiu speco de muziko. Se ĉi tio estus prava, oni povus estetike analizi la popularan stratan muzikon — mi uzos por ĝi la inernacie akceptatan esprimon *pop-muziko* — sed la praktiko pruvas, ke tio ne estas ebla. En la praktiko pruviĝas, ke la disvastiĝo de la pop-muziko (ŝlagro ktp.) dependas de ekstermuzikaj faktoroj. Karakterize estas, ke la publika opinio ne konas nivelan diferencon inter la verkoj de la pop-muziko. La muzika kritiko severe prijuĝas la verkojn de la arta muziko, trovas multajn verkojn ne bonaj — sed koncerne la pop-muzikon ĉiu kritiko eksilentas; ĝuste, ĉar la problemoj de la pop-muziko apartenas al la sociologio kaj ne al la estetiko.

Estas fakto, ke nuntempe en la tuta mondo la homo havas pli multajn eblojn aŭskulti altnivelan artan muzikon, ol en la pasinto (per radio, fonodisko, multaj publikaj koncertoj ktp.). Ĉi tiu fakto havas certe multajn avantaĝojn, sed samtempe ankaŭ negativajn sekvojn. La muzikaŭskultado estas en nia tempo ne tia socia evento, kia ĝi estis antaŭ kelkaj jardekoj. La koncertoj fariĝis en nia tempo pli kaj pli reprezentaj kunvenoj, kiujn ĉeesti eble „decas" kaj pro tio la ĉeestantoj ne ĉiuj estas muzikamantoj. En ĉi tiu okazo la aŭskultado de koncertoj fariĝas afero de riĉuloj, precipe, se mondfamaj artistoj prezentadas sian arton kontraŭ altaj enirprezoj.

En la socialismaj landoj la afero estas alia. La laborantoj havas la eblon viziti ĉiun muzikan prezentadon, koncerton aŭ operoprezenton — sed pruviĝis, ke ne multaj eluzas ĉi tiun eblon.

Estas ja vere, ke la ofta aŭskultado de valora muziko edukas por la ĝuo de la arta muziko, sed ĉi tiu procezo estas longedaŭra, tro longedaŭra por nia tempo. Pli profunde kaj pli rapide estas atingebla la ĝusta muzikaŭskultado per sistema lernado.

Certe ne estas superflue mencii: se pli da homoj ol ĝis nun partoprenus en la muzikkultura vivo, ilia etikamorala kaj humanisma kulturo plialtiĝus. Ĉi tio estas ankaŭ la celo de nia movado. Pro tio mi avide atendas la rimarkojn, opiniojn de vi, karaj legantoj, pri la supre priskribitaj problemoj, de fakuloj kaj nefakaj muzikamantoj.

Ne estas malfacile trovi la interligon inter la muzikkulturo kaj Esperanto. Antaŭ la esperantistaro staras la tasko eluzi la internaciecon de la muziko por fortigi la movadon de Esperanto; kaj kontraŭe — ni eluzu la internaciecon de nia movado por levi la nivelon de la humanisma muzikkulturo de nia anaro kaj por fari nia pli efika propagandilo la altnivelan artan muzikon.

dr-o Lajos LESZNAI

Emilja Lapenna:
NOVA TEATRO

Monologoj. Eld.: Kroatia Esperanto-Ligo, Zagreb, 1974. Redakto kaj prologo de Marinko Ĝivoje. 56. p. 16x12 cm. Broŝurita. Prezo neindikita.

Emilja Lapenna ĉiam apartenis al la celkonsciaj figuroj de nia kultura vivo, kaj certe ankaŭ tiu ĉi kolekto de naŭ monologoj el ŝia plumo konfirmas tiun ŝian trajton. La esperanta teatra arto kaj dramverkado lamas — en la numero 5/1974 ankaŭ nia revuo provis kontribui al la ekzameno de la problemo — kaj en tiu ĉi volumeto la recenzanto ĝojas saluti ankaŭ konkretan *agon* sur tiu tereno.

La aŭtoro sukcesis doni ĉi tie tre taŭgan materialon, kiu tamen ne malatentas la malriĉajn eblojn de la esperantista mondo, kaj ni esperu, ke multaj surscenigoj sekvos la aperon de la libreto. (Krom surscenigoj oni povus ie eldoni ankaŭ son-kaseton kun kelkaj monologoj).

La verkoj mem nepre superas la kutiman nivelon de niaj originalaj teatraĵoj, sed, kiel le aŭtorino mem skribas, „sur malplena vojo eĉ spliteton oni rimarkas". Nu, tiu ĉi libro estas almenaŭ splitego, kaj kelkaj pecoj el ĝi eĉ pli. Plej sukcesintaj estas *Soleco* (ĵurnalistino intervjuas solece vivantajn virinojn), *Amforo* (parolas retrovita malnovgreka amforo) kaj *Brando* (ebriulo trapasinta la tutan historion rakontas, kiel kaj kial li estis ekzekutita en diversaj epokoj). Bedaŭrinde la fino de tiu ĉi politike spicita monologo (ĝia etoso memorigas pri la *Apokrifoj* de Ĉapek) ĉe la fino estas fuŝita: proponi libron anstataŭ brando, nu, almenaŭ estas tro didaktika. Kaj cetere — mi mem konas plurajn librojn, kiu malutilas pli, ol la plej aĉa brando.

Resume: la libreto donas taŭgan materialon por surscenigo en literature valoraj tekstoj. Oni honoru ĝin per inda aĉeto.

V. BENCZIK

TEMPO ESTAS MONO

Per aeroplano
vi atingas viajn vojaĝcelojn
dum kelkaj horoj,
ŝparas tempon
veturante per
niaj aviadiloj.
Niaj aviadiloj trafikas
al 35 urboj
de Eŭropo kaj
Proksima Oriento

MALÉV
Magyar Légiközlekedési Vállalat
Budapest V., Váci u. 1–3.

Dudekjara la Pionira Domo en Pécs

Ni jam informis pri la hungara pionira movado (1961, 3—4), iom simila al la movado skolta, sed spririte socialisma. Multaj pioniraj sloganoj tamen similas al la skoltaj; ekz-e: „La pioniro fortigas la amikecon inter la popoloj".

Ne mirinde do, ke nun jam en multaj hungaraj pionir-trupoj troviĝas viglaj E-fakrondoj, kiuj vere flegas internacian amikecon per korespondado kaj renkontiĝoj, precipe en la ĉiusomeraj pionir-tendaroj internaciaj, aranĝataj en Pécs. Efike kaj tre bonvole helpas tion la tiea Pionir-Domo „István Szabó": la nomdonanto estis soldato de la Konsilia Respubliko en 1919 kaj martiro de la laboristaro. En tiu junulara domo laboras en dek kvin ejoj diversaj fakrondoj (belarta, folklordanca, blovorkestra, desegna, radio-amatora, konstrua, kemia, celpafa, aviadil-konstrua, fervoj-modelanta, pupista, motorista, naturamika, foto-amatora, teatroluda). La belan domon oni establis por pioniroj en 1954; ĝi havas ankaŭ dancoĉambron, fabelĉambron, laboratoriojn kaj apude belan parkon. La direktorino estas *Elizabeta Kóczián*, mem esperantistino.

La Pionir-domo eldonas ekde ok jaroj la malgrandan revuon „Pioniro", redaktatan de profesorino *Helena Hegedűs* kun la helpo de *Elizabeta Pallós;* ĝi disiras al 20 landoj. En ĝi troviĝas ekzercaj kaj instruaj artikoloj, lecionoj kun bildoj, poemetoj, kantotekstoj, diversaj historiaĵoj kaj kulturaĵoj hungaraj. La nunjaran nron 4—5 redaktis tri knaboj-pioniroj dediĉe al la jubileanta Pionir-Domo, kun la konigo de ĝia historio kaj agado, kaj ĝia distingo per la Ruĝa Silka Flago fare de la Jun. Kom. C. K. — plej alta premio por pioniroj.

Por la jubilea festo, al kiu oni invitis ankaŭ la E-fakrondojn el ses lokoj, ĉiu fakrondo preparis ion prezentotan.

Konforme al la kvara leĝo pionira: „la pioniro helpas ĉie, kie li povas", ili donas helpon ankaŭ al la internacia lingvo, ĝoje servante dum aranĝoj, kunvenoj, festoj.

Ni menciu ankoraŭ, ke la Pionir-domo en Pécs estis inter la unuaj en la lando; en Budapeŝto oni inaŭguris la Pioniran Palacon nur en 1963; en ĝia pretigo helpis organizaĵoj, fabrikoj, laboristoj, kaj — per laboro — la loĝantaro.

Ankaŭ ĉi-jare niaj pioniroj aranĝos Internacian Pionirtendaron; ĝi okazos 10—12 de julio.

P. Balkányi

LETERKESTO

Al s-rino M. Bartovská, Frydek-Mistek, Ĉeĥoslovakio. Viajn proponojn pri filmoj dublitaj kaj gazeto por virinoj en Esperanto ni legis kun intereso. Hungara Esperanto-Asocio jam faris paŝojn kaj havas tri mallongajn filmojn dublitajn. Eldoni gazeton destinitan al virinoj ni ne povas entrepreni. En HV ni intencas en la futuro startigi rubrikon kun temoj por-virinaj.

Al s-ro L. Kristensen, Aarhus, Danlando. Ni klopodas kiel eble plej detale prezenti la hungaran literaturon. Se Vi trafoliumas la HV numerojn de la pasintaj dektri jaroj, certe ankaŭ Vi konvinkiĝos pri tio. Tiun tendencon ni daŭrigas. Ni tre esperas, ke ni sukcesos eldoni novan antologion de la hungara literaturo, ja la malnova aperis antaŭ kvardek jaroj!

Al s-rino E. Schröter, Brandenburg. Germana Demokratia Respubliko. Certe multaj homoj spertis la samon, kiun priskribis Gyula Fekete en sia artikolo. Ni dankas Viajn bondezirojn kaj ni esperas, ke ankaŭ en la futuro nia revuo meritos Vian plaĉon.

Al s-ro O. Stolberg, Leipzig, Germana Demokratia Respubliko. Ĝoje ni legis en Via letero: „... la numero 1/1974 estas tre valora. Mi parolis en nia laborgrupo pri la Esperanto-literaturo kaj historio. Nun la artikolo de William Auld pri Esperantaj romanoj kaj tiu de Kalocsay pri la Esperanta novelo estas bonvena suplemento por miaj daŭrigoj...". Nia celo per la trarigardo de E-literaturo estas doni helpon por facile orientiĝi en la granda materialo de la temo.

Al s-ro D-ro A. Bogdanov, Kiev, Sovetunio. Ni dankas Viajn bondezirojn. Bedaŭrinde Vian peton ni ne povis plenumi. La tempo inter la redaktado kaj apero de nia revuo estas tro longa por freŝdate aperigi Vian alvokon.

Al s-ro K. S. Istomin, Leningrado, Sovetunio. Ni akceptas Vian rimarkon kaj, kiel pasinte, ankaŭ en la futuro ni okupiĝos pri gramatikaj kaj stilaj demandoj. Pri la problemoj kiun elvokas „neŭtraleco" ni respondos en letero.

Al s-ro J. Gold, Riga, Sovetunio. Ni citas el Via letero: „Nun mi tradukis el Hungara Vivo 4/73 fantaziaĵon „URANIA" de S. Szathmári. Mi eventuale povos proponi ĉi tiun tradukon al lokaj periodaĵoj...". Ni deziras sukceson por la afero. Vian peton ni peris al la aŭtoro.

Al s-ro T. Kulagin, Moskvo, Sovetunio. Ni dankas Vian sciigon. Vidu la respondon al s-ro d-ro A. Bogdanov.

SÁNDOR SZATHMÁRI

verkisto hungara kaj esperantista, aŭtoro de „Voĵago al Kazohinio", „Maŝinmondo" kaj multaj noveloj, pli ol jardeka kunlaboranto de HUNGARA VIVO mortis la 27-an de Septembro 1974 en Budapest, post longa, turmenta malsano.

Freŝe vivas en nia memoro la intervjuo donita en la numero pri S. Szathmári (3/1973.H.V.) kaj jen, la senindulga Morto nun devigas nin diri lastan adiaŭon al li, esprimante sinceran kondolencon al lia funebranta familio.

Redaktoraro de Hungara Vivo

Ĉu vi ankoraŭ ne vizitis la 2000-jaran urbon Pécs?

Ĉu vi ankoraŭ ne ĝis la amikan esperantistan etoson de IREN en Abaliget? Ne povas esti!!! Nepre aliĝu al la Internacia Renkontiĝo Naturamika — riĉa programo — favoraj kotizoj — rabatoj

Organiza Komitato
H—7601 Pécs 1. Pf. 2. Hungario

Recenzo

Unuaj libroj por esperantistoj (iam kompletigota plena verkaro de L. L. Zamenhof) kajero 1. Eldonejo: Ludovikito, Kioto 1973. Desegnis M. Fruscieva. Formato A5, 156 paĝoj, tole bindita. Prezo: 18 gld.

La kompilinto de la libro en sia „Antaŭklarigo de malnovaj-amanto" skribas inter aliaj:... Originala Verkaro" estas precipe interesplena por mi. En ĝi ja troviĝas ia vivo. Tamen mia nuna provo... pretendas eltiri ... nur liniojn, kiuj en ia maniero rilatas al la malnovaj libretoj... tiajn liniojn, kiuj per si mem parolas pri tiu malnova tempo. Kelkaj el ili nuntempe ne estas facile haveblaj. Do mia fingra ekzerco esperebleneestos tiom vana..."

Vere ĝi ne estis vana laboro. La materialoj: Internacia Lingvo. Antaŭparolo kaj Plena gramatiko de Esperanto el 1887., Dua Libro de l' Lingvo Internacia el 1888. kaj Aldono al la Dua Libro de l' Lingvo Internacia el 1888., represitaj en la libro, estas raraĵoj kaj por la novaj adeptoj de la Internacia Lingvo preskaŭ ne akireblaj.

Atentindajn studojn trovas la leganto ĉe la fino de la libro. El tiuj prezentiĝas tute novspeca vidmaniero pri temoj lingvistikaj kaj historiaj laŭ la okuloj de japanoj.

Mi kun ĝojo legis la volumon (kiun la kolektantoj nomis modeste „kajero") kaj deziras multajn sukcesojn por la efektivigo de la plano, por la aperigo de plena verkaro de L. L. Zamenhof!

L. RIETH

LINGVO KAJ LOGIKO

L. MIMÓ: *Kompleta Lernolibro de Regula Esperanto. Analiza Skolo.* Eldonis la aŭtoro. Sabadell, 1973. 192 pp. 16 x 21 cm.

La verko dividiĝas en 3 librojn kaj 31 lecionojn. Tamen, nur la unua libro (78 pagoj) estas efektiva lernolibro kun ekzercoj, la 2-a kaj 3-a libroj enhavas prefere teorian pritraktadon de la konjugacio kaj vortfarado. Ĉu kaj kiom la libro taŭgas por ellerno de la lingvo, tion povas montri nur la sperto; cetere el ia ajn lernolibro oni povas lerni E-on, se oni volas. Mi dubas nur pri tio, ĉu konvenas kelkaj teoriaj-logikaj analizoj jam en la 8-a aŭ 9-a leciono; mi timas, ke tie ili nur konfuzas la komencanton.

Mi volus amplekse okupiĝi pri la libro, ĉar pluraj el niaj legantoj petis pritrakton de gramatikaj demandoj, kaj la recenzo de ĉi tiu libro donas por tio bonan okazon.

Unue, temu pri la logikeco, pri ĝia signifo en la lingvo. La aŭtoro tre alte taksas la logikon, metante ĝin, ŝajne, super ĉiujn aliajn konsiderojn. Tial li presigis kape de la libro la zamenhofan frazon: „En la lingvo internacia oni devas obei sole nur la logikon". Tamen, Zamenhof skribis ankaŭ: „Lingvo absolute logika kaj tute sen idiotismoj estus lingvo senviva kaj tro peza".

La kontraŭdiron inter ĉi tiuj du citaĵoj oni povas solvi konsiderante, ke la unuan Z. diris teorie, la duan ĉe pritrakto de la E-a stilo, do vidpunkte de la praktika lingvouzo. Antaŭ la dua frazo li ripetas ja, ke la stilo E-a estas simpla kaj logika, sed li aldonas: „tamen ĉio devas esti en ĝusta mezuro".

Kaj jen kio mankas al la aŭtoro: *la ĝusta mezuro.* Li volas per la „sekca bisturio" de sia logiko eltranĉi el la lingvo esprimojn familiarajn al ĉiuj, ĉar, laŭ lia defia devizo: „Centjara tradicio nek sanktigas nek sankcias erarojn".

Ĉe tia ĝisosta logik-zeloto nevole oni pensas pri tio, ĉu li mem estas do tia modelo de logikulo, ke oni vere povas sin translasi al lia „harfendado" (li mem fiere konfesas sin harfendisto). Ni esploru baze de unu kazo, kiel li rezonas laŭ la feraj leĝoj de la sankta logiko.

En la § 47 ni legas: *„Oni ne povas uzi prepozicion antaŭ infinitivo".* Post ĉi tiu regulo en la gramatikoj oni aldonas kutime: esceptoj estas POR, KROM, ANSTATAŬ. Sed en la gramatiko de la REGULA Esperanto de Mimó esceptoj ne havas rajton de ekzisto. Tial li aldonas en la § 53, ke la uzo de infinitivo post tiuj prepozicioj *ne estas escepto,* ĉar ĉikaze ili funkcias ne kiel prepozicioj, sed kiel konjunkcioj, t.e. ili, kiel DUM, estas jen prepozicioj, jen konjunkcioj.

Nu, en ĉi tiu rezonado troviĝas tri dikaj eraroj:

1. La aŭtoro kulpas logikan eraron, kiam li ne rimarkas, ke li volas elimini esceptecon per alia escepteco. Oni povas nome demandi, kial nur tiuj prepozicioj povas funkcii jen prepozicie, jen konjunkcie, kaj kial ne ankaŭ aliaj, ekz-e *sen* aŭ *pri.*

2. La dua eraro estas, ke la supraj tri prepozicioj *eĉ ne povas funkcii konjunkcie.* Oni ne povas diri: „lernu, anstataŭ (aŭ „krom") vi ludas", sed oni devas aldoni la subjunkcion „ke": „Lernu, anstataŭ ke vi ludas" aŭ „Lernu, krom ke vi ludas."

3. En la unua eraro troviĝas ankoraŭ unu eraro. Ĝuste tiuj du prepozicioj, kiuj povas funkcii ankaŭ subjunkcie, t.e. ĜIS kaj DUM, ne povas esti uzataj antaŭ infinitivo. Oni ne povas diri, ekz-e: „Dum manĝi li legis gazeton". Ie en la libro la aŭtoro uzas infinitivon post ĜIS, sed tio estas nek Fundamenta nek Zamenhofa, eĉ, tute senekzempla. Male SEN kun infinitivo estas uzata pli kaj pli, dufoje oni trovas ĝin ankaŭ ĉe Zamenhof,

Alia afero. La aŭtoro tutpaĝe kaj kun emfazege grasaj literoj anoncas pri sia libro, ke ĝi estas *liberanaliza, racia, tutmonda, scienca, sendogma, sen personaj kultoj, Fundamenta, Zamenhofa, perfekteca.* Mi ne povas prisilenti, ke tia afiŝita memlaŭdo ne estas plaĉa. Krome inter la epitetoj troviĝas ankaŭ kontraŭdiroj. Se nome la libro estas emfazege, do absolute Zamenhofa, tiam ĝi ne povas esti emfazege, absolute sen personaj kultoj. Kaj se ĝi estas emfazege, absolute Fundamenta, tiam ĝi ne povas esti emfazege, absolute sendogma. La parada prezento, tutpaĝa afiŝado de tiuj epitetoj do montras refoje, ke la aŭtoro ne konas tion, kion Z. nomis *ĝusta mezuro.* Lia nerimarko de la kontraŭdiroj, aliflanke, vekas kelkan dubon pri lia senso de logiko.

Sekvafoje temos pri la vortfarada parto de la libro.

(Daŭrigota)

K. KALOCSAY

HAMBURGO–UEA KONGRESO

Triobla evento katenis ĉiun minuton da la partoprenantoj: la urbo, la „Congress Centrum Hamburg" (CCH) kaj la kongreso mem.

La urbo, pri kies profunda ekkono oni devis rezigni pro tempomanko, gardas la historion da la liberaj Hansa-urboj kaj la riĉecon de ĝiaj burĝoj. La nordeske dignoplenaj konstruaĵoj, la muzeoj, kaj universitatoj, la angleska pureco de la modernaj loĝkvartaloj kaj la ĉarmaj enurbaj lagetoj donas por semajnoj sufiĉe da vidindaĵoj, same kiel la tumulto de la grandega haveno aŭ la kvartalo St. Paŭli per sia ekstreme bizara-pikanta atmosfero.

Nia pli malgranda, sed vere memstara mondo estis CCH, kiu apartenas certe al la plej unuaj inter la samcelaj establaĵoj de la terglobo. Vico de teatra, prelega, seminaria kaj konversacia salonoj atendis nin en ĝi. Ili taŭgas kontentigi la plej diversajn dezirojn, kvankam la orientiĝo inter ili ekzamenis iom niajn kapablojn. La tuta medio atestis pri tre altgrada estetika pretendo.

La panoramo de sur la supra teraso de nia hotelo konkuris kun tiu de la televidturo, nia antaŭdoma florĝardeno estis la fama „Planten und Blumen".

Ĉi tiu kadro kaj entute la tie pasigitaj tagoj elvokis en la partoprenantoj la plaĉan senton: aparteni al altprestiĝa movado. Krome, vekis altan memtaksadon, ke pli ol dudek registaroj, reprezentigis sin (eĉ kelkaj alparolis Esperante:Usono, Israelo) kaj ke la Mondasocio de Sciencistoj kaj la 2-a Internacio anoncis sian decidon pri oficiala uzado de Esperanto.

La kongresprogramo prezentis varian eblecon por ĉiuj: gajni informaciojn, aktive formi la movadon, renkontiĝi kun societoj de sama interesiĝo, ĝui la amuzajn programerojn.

Pri la kongresaj okazintaĵoj detale raportis jam la gazetaro, televido- kaj radiodissendejoj. Gratulinde la plej freŝaj kaj vastaj estis la raportoj de Radio Varsovio, kies redaktoro partoprenanta la konreson, ĉiutage plurfoje zorgis pri interesaj raportoj.

La laborprogramoj kaj simile la distraj estis bonsukcesaj. La kongresanoj vigle partoprenis la organizaĵojn kaj la salonoj estis vizitataj okaze de la Somera Esperanto Universitato same, kiel ĉe la diversaj kunsidoj. Dank' al la LKK- anoj senlace laborantaj, la kongreseventoj glate marŝis kaj la etoso estis bona. Pretendeco karakterizis ĉiun prezentadon, escepte kelkajn epizodojn, konekse kun la financa situacio kaj la enprogramitaj elektoj. Laŭ nia opinio nepre estus evitindaj similaj situacioj! Nome, la kongresanoj estis devigataj okupiĝi pri temoj, pri kiuj aperis cirkuleroj, artikoloj, aŭdiĝis diversaj opinioj, sed kiuj ne estis sufiĉe pretigitaj kaj esploritaj pere de la aŭtentikuloj! Ĉu la estraranoj vere ne povis pli klare prezenti la faktojn diskutitajn? Bedaŭrinde la elektita maniero estis senrezulta. Espereble la novelektita estraro „retrovos tiujn kuraĝon kaj saĝon, kiuj estas necesaj por antaŭenigi Esperanton en la sekvonta historia periodo" — kiel diris la eksprezidanto en sia parolo.

Vere, la ferma kunsido de la kongreso jam montris antaŭen. La komitato kaj la nova estraro unuanime akceptis la laborprogramon kaj la kongresajn rezoluciojn!

Nia memoro longe konservos la ekscititan, respondec-plenan etoson de la diskutoj pri la estonto de la movado, kaj tiujn entreprenemon kaj forton, per kiuj tiu ĉi kongreso solvis sian pezan, doloran sed necesan taskon. Ni adiaŭis al personoj, kiuj multe rolis en la movadgvidado kaj al la arkaikiĝinta politika strategio, kiun ili deklaris sole ebla.

Feliĉe ni kunportis el Hamburgo kiel la plej gravan memoraĵon la memfidon de homoj, kiuj kapablas kaj kuraĝas komenci novan vojon.

S. J. — Ba.

ALVOKO AL NIAJ EKSTERLANDAJ LEGANTOJ

Nia revuo plublikigas ĉi-numere grandsignifan intervjuon kun Sándor Gáspár, *ĉefsekretario de la Landa Konsilio de l' Hungaraj Sindikatoj. Ni petas niajn legantojn, ke pri la esenco de la intervjuo ili informu la ĉefsekretarion de la sialanda Sindikata Centro, kaj veku per konvinkaj argumentoj lian atenton pri tio, ke estus grave, se li elpaŝus por Esperanto per simila publika deklaro.*

Ankaŭ pri tio ni petas niajn eksterlandajn legantojn, ke ili bonvolu saluti en mallonga esperantlingva letero la ĉefsekretarion Sándor Gáspár *pro lia por-Esperanta deklaro kaj pro tiu lia promeso, ke ĉi tiun grandan aferon li subtenos ankaŭ ĉe la internaciaj forumoj de la sindikatoj. Krom tio, ili informu lin, ke lian deklaron ili konigis letere ankaŭ al la ĉefsekretario de la sialanda sindikata centro.*

Per la deklaracio de la ĉefsekretario de l' hungara sindikata konsilio, nome, ni deziras komenci internacian agadon en la intereso de tio, ke la internaciaj centroj de la sindikatoj faru interkonsenton por la grandaskala disvastigo de Esperanto. Tion ni volas akceli ankaŭ per nia antaŭa peto al niaj eksterlandaj legantoj. Per viaj leteroj adresotaj al Sándor Gáspár ni atingos tion, ke la hungara ĉefsekretario vidos, ke la lia deklaracio oni reagas ankaŭ eksterlande.

La leterskribantoj, kompreneble, ne menciu ĉi nian peton: ilia letero gardu la karakteron de individua reago. Kaj ili subskribu sian plenan nomon, okupiĝon, adreson. Ili adresu sian leteron jene: Gáspár Sándor, *a Magyar Szakszervezetek Országos Tanácsának főtitkára. H—1415 Budapest, VI., Dózsa György út 84/b. Magyarország—Hungario.*

ESPERANTO — DRAMO



Kiel kutime nia enigmo koncernas la titole menciitan temon, ĉeftemon de nia nuna numero. Ensendi sufiĉas nur la solvon de vicoj H.: 1., 8. kaj 61.; V.: 1. kaj 51.

Limdato de la alsendo: la 1-a de januaro 1975.

HORIZONTALAJ VICOJ: 1. *Julio BAGHY en „Sonĝe sub pomarbo", triakta lirika komedio, skribas en la Unua Akto, Unua Bildo: ... „Ne nur de l' Ter' radias elemente /la vivosenc' tiranta nin torente;/ transtere, tra l' eter', en Universo... la daŭrigon vidu en vicoj 8. horizontala kaj 51. vertikala.* 14. Granda, akra korneca elkreskaĵo ĉe la ekstremo de bestaj aŭ birdaj fingroj. 15. Tuŝis per lipoj por esprimi respektan amon. 16. Memfidi pri veraj meritoj kaj virtoj. 17. EDE. 18. AB. 20. Latina saluto (AVE). 21. KI. 22. Nenormala malgrandegulo (Radiko). 23. Interefiko (R). 25. Hejma servisto ĉe riĉuloj. 27. Vira kapvesto ĉe Orientaj popoloj (R). 29. Komenco de avizo! 31. Stilekzerco, en kiu oni penas malkaŝe imiti la manieron de fama verkisto (R). 33. Movu vin antaŭen per piedoj. 34. Grandaj muzikaj verkoj por orkestroj. 37. Reen: Rilata al iu sekso. 38. Protektado, patronado. 39. Senpieda rampanta vertebrulo (R). 40. Multfoje okazanta. 41. Persona pronomo. 42. Malofte uzata persona pronomo. 44. ...-Leono: Afrika ŝtato. 45. Sufikso. 46. RM. 47. Virino laŭleĝe ligita kun viro. 49. KRT. 50. Soveta politikisto, ŝtatestro (Josif, Visarionoviĉ 1879—1953). 51. Nobelio. 52. Flaveca ĝis ruĝeca tero, uzata kiel pigmento por farboj. 54. Ili apartenas al vi. 55. GU. 57. Ne fakula. 61. Fino de la titolo de vico 1. vertikala. 64. Propra al unu homo. 66. Rilata al aperturo de la buŝo. 68. Speciala vico de fruktarboj. 70. Altranga oficiro (R). 72. Speco de teksaĵo (R). 73. Konjunkcio. 74. Tabelvorto. 76. Prefikso. 77. OTT. 78. Sufikso. 80. Juna naskito de iu rabobesto. 82. Prefikso. 83. Ano de filozofia skolo, fondita de Zenono. 86. Konsistiga elemento de la skeleto de la vertebruloj (R). 87. Radiko de la vico 68. 90. Havanta kaŝitan alegorian signifon. 92. Granda sportejo (R). 93. Parto de anatomio kiu studas la ostojn (R). 95. Opero de Verdi.

VERTIKALAJ VICOJ: 1. *Titolo de originala Esperanto-dramo de Marjorie BOULTON, prezentita la unuan fojon dum la 51-a UK. en Budapeŝto. (Finon de la titolo donas la vico 61. horizontala).* 2. Sufikso. 3. Aŭtoro de la originala Esperanto-romano „D-ro Dorner" kiu aperis en 1945. (EGERRUP). 4. Adverbo. 5. Tute similas. 6. AK. 7. Apartenas al ni. 8. Tabelvorto. 9. Osmio. 10. Havantaj aktivajn ecojn. 11. Persona pronomo. 12. Monumento, por memorigi mortinton (R). 13. Rilata al valora metalo. 19. Uzis akvon por puriĝi. 21. Granda, dika kapuĉhava mantelo (R). 24. IB. 26. Ejnstejnio. 28. Juna naskito de iu rabobesto. 29. Kontinento (R). 30. Ne havanta propran movon (R). 32. Ruza agado por sukcesigi aŭ faligi aferon (R). 35. Diservo (R). 36. Rilata al insekso. 40. Rilataj al valora metalo. 43. Kolora likvaĵo por skribi. 45. Malgrandaj. 48. Valora metalo (R). 50. Silicio. 53. Grasa likvaĵo. 54. Parto de homa vizaĝo. (R). 56. Brutloĝejo (R). 58. Sufikso. 59. Reen: Numeralo. 60. Surprizo pro io stranga, nekutima. 62. Homo praktikanta korpajn ludojn (R). 63. Sufikso. 64. Oficiala raporto (R). 65. Balono entenanta gason, uzata por veturi (R). 66. Reen: Prepozicio. 67. Rilata al homo amanta sian patrujon. 69. Sufikso. 71 Adverbo. 74. IGO. 75. Kuŝmeblo (R). 79. Ripetos laŭvorte. 81. Speciala punkto de la ĉiela sfero (R). 84. Materio de la skeleto de vertebruloj. 85. Malsupra ĉeftrabego de ŝipoj. 88. Laŭ konduto de pavo. 89. Speco de grimpoplantoj vivantaj en tropikaj arbaroj (R). 91. Reen: Granda. 92. SRE. 94. Neoficiala sufikso. 95. TV.

FERI

La ĝusta solvo de nia enigmo aperinta en HV 74/3 estas: SEKRETAJ SONETOJ — BOULTON — KVAROPO — ORIENTA FLORBEDO — SONĜE SUB POMARBO — JUBILEA — JE LA NOMO DE L'VIVO — ZAMENHOF.

Libropremion gajnis: Dr. Karl Schulze, 110 Berlin, Laudaer Str. 40., DDR; Dr. Aurel Boia, Str. Giulesti 42., ap. 42., Bucuresti 17., Rumanio; Károly Ságvári, 2067 Szárliget, Dózsa Gy. u. 57.

Ekzameno sen risko

Ekzamenanto: Vilmos Benczik

Ĉinumere nia enigmo traktos la libron *Okupacio* de Erni Krusten. Kiel kutime, partoprenos la lotumadon de la libropremioj tiuj, kiuj alsendos ĝustan solvon al minimume du demandoj.

1. Kio estis la *Estona Legio*?

2. La rakonto havas rolantinon, kies nomo estas bone konata el biblia historio. *Bv. alsendi tiun nomon.*

3. Ie en la teksto legiĝas la sekva frazo: „Vi certe malŝate rigardas mian trinkadon rekte el botelo, sed por mi tio estas grava, tio ne estas ordinara vulgareco aŭ kaprico." *Bv. alsendi la nomon de la rolanto, kiu diras ĝin.*

Solvoj de la numero 3/1974:
1/ B. Price- Heywood
2/ K. Kalocsay: Lingvo, stilo, formo
3/ N. V. Nekrasov: Letero al Leo Belmont.
F. Szilágyi: Vivraporto.

Libropremion gajnis: Reto Rossetti, 120 Cromwell Road, Bristol 6. Britio kaj Victor Aroloviĉ, Moskvo G 19, Poŝtrestante, Sovetunio.

HUMURO

Rifuĝemo

La limgardisto longe rigardadas la pasporton de geedzoj. Li turnas sin al la edzo kaj diras:

— Ĉu vi povas pruvi, ke la sinjorino estas via edzino?

— Mi donos al vi 500 dolarojn, se vi povos pruvi, ke ŝi ne estas mia edzino.

Kostumo

Du viroj interparolas:

— Mia edzino estas tre ŝparema virino. Imagu, el sia balkostumo ŝi farigis por mi kravaton.

— Neniaĵo! Mia edzino farigis por si el mia kravato balkostumon.

Logike

En la psikiatria hospitalo kelkaj flegatoj kartludas kaj unu flegato pendas super ili sur la lustro. Venas flegisto kaj demandas:

— Kial tiu pendas sur la lustro?

— Li pensas, ke li estas elektra lampo kaj lumigas por ni.

— Sed kial vi ne deprenas lin de tie?

— Ĉar ni ne volas kartludi en mallumo.

Neĉiutagaĵo

— Hieraŭ mi ĉeestis neĉiutagan geedziĝon — rakontis Zizel. — Post kiam la fianĉino eldiris la feliĉigan jeson, policano ŝin forkondukis.

— Kial do, kion ŝi faris, ke oni ŝin arestis?

— Nenion. La policano estis ŝia nova edzo.

Vidpunkto

Du amikinoj konversacias sur plaĝo.

— Ĉu vi jam banis vin?

— Jes.

— Kia estas la akvo?

— Admirinda. Ĝi estas plena de viroj.

Konoj

— Panjo, — diras la sesjara Steĉjo —, imagu, mi sciiĝis, ke la infano naskiĝas post naŭ monatoj.

— Nu bone, — respondas la patrino, — se vi tion scias, estu kontenta pri tio.

— Tamen, panjo, mi volus scii, de kiam oni devas kalkuli tiujn naŭ monatojn.

Edza pento

— Mia edzo min forlasis antaŭ dek jaroj — rakontas sinjorino Muskat al sia najbarino.

— Sed vi havas ja kvar etajn infanojn!

— Nu jes. Sciu, de tempo al tempo li venas hejmen sin ekskuzadi.

Profesio

Juna paro promenas en parko. Aĝa viro venas renkonte kaj la juna viro salutas lin.

— Kiu estis ĉi tiu? — demandas la junulino.

— Mia helpkolego. Li subskribas tiujn leterojn, kiujn mi portadas al la poŝto.

Regalo?

Granda krako, karambolo, la aŭtuloj elsaltas el sia ĉaro, unu el ili estas speciele ekscitita, sed la alia akcidentulo lin trankviligadas.

— Ne estu tiel nervoza! Jen, prefere sorbu iom el ĉi tiu botelo! — kaj li jam etendas al li la konjak-botelon.

La aŭtulo regalas sin per abunda gluto.

— Dankon, ĉi tio gustis bonege. Sed kial vi mem ne trinkas?

— Mi prefere prokrastos la trinkon, ĝis la policano faros la alkohol-teston.

Senelire

Aĝa onjo sidas en la kuracista atendejo kaj silente trikas. Elvenas la flegofratino kaj diras:

— Hodiaŭ ne okazas konsultado.

La onjo trikadas plu. La flegofratino diras nun krie:

— Ne okazos konsultado.

La onjo trikadas plue. La flegofratino prenas krajonon kaj paperon kaj skribas grandlitere por la surda onjo.

„Hodiaŭ ne okazas konsultado".

La onjo rigardas la paperon bedaŭre kaj poste petas:

— Bonvolu laŭtlegi, kion vi skribis, ĉar mi forgesis hejme miajn okulvitrojn.

E HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
1368. Budapest, Hungario,
Kenyérmező u. 6.
Aperas dumonate
XIV. jaro. 1974. 5-a numero

Ĉefredaktoro: *Mihály Gergely*
Responda redaktoro:
d-ro Jozefo Mátéffy
Lingva revizio: *K. Kalocsay*
Arta redaktoro: *Jozefo Szekeres*

Redaktoraro:
D-ro Pál Avar, d-ro István Bácskai, Szilárd Bálint, Vilmos Benczik, Ada Császár, Ervin Fenyvesi, Zsolt Gyarmathy, d-ro Lajos Lesznai, Alfonso Pechan, Aurél Ponori Thewrewk, Mária Szabó, d-ro István Szerdahelyi, Tibor Újlaky-Nagy, Gábor Vigh

Ĉefkunlaborantoj:
D-ro Géza Bárczi, Paŭlo Balkányi, Károly Jobbágy, Mór Korach, Ludoviko Kökény, Lajos Tárkony

La redakta komitato ĉiun merkredon kaj la unuan kaj trian ĵaudon de ĉiu monato posttagmeze de la dua ĝis la kvina horo havas akceptotagon.
Redakcio: Budapest, VIII.
Kenyérmező utca 6.
Telefono: 141-078

Eldonas: „Népszava" Gazeteldona Entrepeno, Budapest, VII., Rákóczi út 54.
Telefono: 224-819

Responda eldonisto: Márton Gábor direktoro

Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215—96162 Budapest. V. József nádor tér 1.) senpere, aŭ per poŝtmandato.

La abono estas por jaro (ses numeroj) Ft. 48.—, al eksterlando krome Ft 9.60 por afranko.

74.3832 Dürer Nyomda
Gyula
Indexszám: *25.377*

BUDALAKK

XYLADECOR

LIGNOKONSERVILO

Diafana lignosirma materio.

Ĝi emfazas favore la vejnaron de la ligno.

Aplikebla kaj ekstere kaj interne.

El ĝi farita tegaĵo estas veterorezista.

Ĝi sirmas ankaŭ kontraŭ insektoj kaj micetozo.

Havebla en la fakvendejoj!

Fabrikas: la **100-jara**

BUDALAKK Fabriko de Farbo kaj Arta Rezino
Farbo kaj Artrezin-Fabriko

Konsumturist



Valoraj artobjektoj
porcelano de bona marko
stilmebloj

Varojn aĉetitajn
en supraj vendejoj oni povas
sendogane elporti el la lando

Vi povas aĉeti el granda sortimento kontraŭ valuto internacie ŝanĝebla

en niaj vendejoj en Budapeŝto
I. Hess András tér 3

Hotel Intercontinental–Hotel Gellért
VI. Népköztársaság utja 27.